


BULGARA

ESPERANTISTO



6. 1980

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO





Sukcese finiĝis elementa E-kurso en uzino „Balkan“ u. Loveč.
Kursgvidanto Koljo Pančev (staranta dekstr.).



Bonege finiĝis E-kurso, 35-persona, en u. Nikolaev, USSR.
Kursgvidanto Grušinskiĵ (sidanta en la unua vico,
la kvara maldekstre).

E N H A V O

• • • La bulgaraj esperantistoj servas al la pa-	1
trolando kaj la paco	
• • • La paco estas nia komuna bemo. Alvoko de	2
la komunistoj al la popoloj de la eŭropaj lan-	
doj pri paco kaj malarmado	
K. V. NI estas armilfrato. Intervjuo kun Vu Kan	3
Donka Jotova. „Ni reviviĝis el la tera infero“. In-	
tervjuo kun Fleš Ferun kaj d-ro MI Samedi . .	4
Saša Nedeva. El la E-vivo en Varno	4
Kr. Karucin. La antaŭkongresa konkurado . . .	5
Slavi Janulov, Stoja Denčeva. Kun la popolaj le-	
gejoj	6
Halm Levi. Sincera interparolo	6
Dimitro Haĝiev. Pilgrimo al la tombo de Trifon	
Hristovski	7
Dimitro Denčev. Denove laŭ la paŝoj de aprilanoj	8
Fani Miĥajlova. Valora helpo	8
Dobrinka Ĉernogorska. Fondita junulara E-sekcio	
en Ruse.	9
Petko Arnaudov. Ekzemplo sekvinda. Stojan Ta-	
nev 70-jara	
Stojto Cankov, Jordan Kalinov. Neforgeseblaj re-	
memoroj	10
Jordan Angelov. Dommastroj de la jubilea kon-	
greso	10
Stelka Bogdanova, Anna Mindova. Li ne mortas.	12
Kunco Karavelov. Ĉiam kun ni	12
Penjo Penev. Lia plejmoŝto la homo. Traduko de	
D. Haĝiev—Tempesto	14
Maria Andelova. Renkontiĝo kun la leningradaj	
esperantistoj	14
Anatolo Ionesov. Lenin en la koroj de la popoloj.	
Interlingvistika agado	15
A. Korjenkov. REVU — XIX	16
• • • Infanoj	16
Tatjana Koptjagina. Tago de Bulgario	16
Stano Marček. Angulenigmo	16
Kliment Veličkov. Por la ĉampiono de la olimpi-	
koj — Nobel-premion!	III
• • • Inspira kaj emociplena	III

Sur la kovrilpaĝo:

El la kongresurbo Plodiv

Redakta komitato:

Kunco VĀLEV (ĉefredaktoro), Vasil BOROVSANI
Evgeni GEORGIEV, Dimitro DENČEV, Dimitro
HAĜIEV, Krāstju KARUCIN, Halm LEVI (viceĉef-
redaktoro), Flori NIKOLOV.

Administranto: Metodj Garev

Korektis: Rajna Konstantinova

Sofio, p. k. 66

Tel. 31-00-29

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1918
Eldonkvanto 6100. Indekso 20229.



LA BULGARAJ ESPERANTISTOJ SERVAS AL LA PATROLANDO KAJ LA PACO

Esperanton la bulgaraj e-istoj uzas por diversaj celoj kaj diversmaniere. Kompreneble, la fakuloj aplikas ĝin en sia profesia laboro, pliriĝigante siajn teoriajn konojn kaj praktikajn spertojn. Tion oni faras kaj en la sfero de scienco kaj tekniko, kaj en la tute praktika laboro en industriaj kaj agrikulturaj entreprenoj. La samon faras ankaŭ multaj amatoroj. Ĉio ĉi estas utila por la disvolvigo de la lando.

Esperanto tamen povas servi kaj sukcese servas ankaŭ kiel taŭga rimedo por konigi al fremdlandaj samideanoj la belafinojn de nia ĉarma patrolando, de la pitoreskaj rokoj de Belogradĉik ĝis la sunplenaj plaĝoj de Drufba kaj Stănčev Brjag ĉe la Nigra Maro, de la „blua“ Danubo ĝis la fabele bela Rodopo. Al niaj neinformitaj kaj plurfoje misinformitaj korespondantoj en Okcidento ni konigas faktojn pri la nuna vivo en Bulgario, sendas al ili bildojn de la imponaj industriaj panoramoj de Dimitrograd, Devnja, Kremikovci kaj aliaj gigantoj de la socialisma konstruado en nia renaskiĝinta patrujo.

Nia popola registaro laŭ oficiala vojo — per diverslingvaj gazetoj, revuoj, libroj kaj aliaj materialoj, per la radio kaj televido — faras multon por popularigi la sukcesojn de Popola Respubliko Bulgario. Sed ĝuste pro sia oficialeco tiu informado ordinare ne efikas tiel senpere kaj tiel forte, kiel leteroj de homo al homo, de koro al koro. La konigo de la mirinde altaj atingoj en la sferoj de ekonomio kaj kulturo estas renkontata kiel propagando, farata de homoj al kiuj oni pagas por tiu celo.

En la nuna momento de politika streĉo en la mondo, la provoj de imperiistoj, militaristoj kaj diverskoloraj reakciuloj haltigi la proceson de mildigo de la interŝtataj rilatoj kaj revenigi la mondon al la malvarma milito, respondeca kaj alta devo de la bulgaraj e-istoj estas klarigi ĉiam, ĉie kaj ĉiel la principan pacan politikon de nia patrujo. Kaj ne nur klarigi, sed ankaŭ aktive helpi la profundigon de tiu ĉi paca politiko, uzante siajn amikajn kontaktojn kun alilandaj e-istoj.

Tamen la nobla laboro de la bulgaraj e-

istoj serve al la patrolando ne ĉiam estas konata al nia publika opinio.

Pri la rolo de E-o kiel rimedo, faciliganta la komunikigon de Bulgario kun alilandanoj, atestas multaj faktoj. Pri ĝi ekzemple parolas la patriota iniciatibo de la E-societoj en Ŝumen, Vraca k. a. urboj pri la temo: „Kion vi scias pri Bulgario“. Tiu enketo donis abundajn rezultojn pri la rilato al nia patrolando fare de la enketitoj. Oni citis la utilegan agadon de samideano Marshal el Londono, kiu faris ekspozicion pri Bulgario el esperantaĵoj kaj aliaj materialoj, senditaj al li de bulgaraj e-istoj; la aktivadon de k-dino Kristina Kaĝaja, gvidantino de internacia klubo de junpioniroj en la kartvela urbo Kutaisi (USSR), kiu kune kun la membroj de tiu ĉi klubo organizis bulgaran vesperon kaj ekspozicion el materialoj, senditaj al ŝi de bulgaraj e-istoj. Riĉenhavan vesperon dediĉitan al Bulgario organizis la E-klubo en u. Miass (USSR) surbaze de materialoj ricevitaj de bulgaraj e-istoj. Similaj vesperoj kaj ekspozicioj abundas en Sovetunio. Pasintjare ekspozicion pri Bulgario aranĝis en sia lernejo la japana instruistino Kanaja Masako kun siaj lernantoj. Pri la patriota pasintjara agado de Rajna Konstantinova el Sofio aperis informoj antaŭ nelonge en „BE“. Konstantinova faris en Britlando tri prelegojn pri la bulgara literaturo kaj aparte pri nia klasikulo Ivan Vazov, pri la sanprotekto de la virino en nia lando, pri la Infanasembleo. Per tio ŝi multe kontribuis por la popularigo de Bulgario en eksterlando, gajnis por ĝi novajn amikojn.

Per E-gazetoj kaj revuoj, eldonataj en nia lando, kiel „Bulgara Esperantisto“, „Paco“, „Scienca Mondo“, „Interligilo“, „Bulgarino“ k. a., per libroj kiel „Biografio de Georgi Dimitrov“ de Stela Blagoeva, „Bofilino“ de G. Karaslavov, „Sub la jugo“ de Ivan Vazov, elektitaj verkoj de Botev, Smirnovski, Vapcarov k. a. la bulgaraj e-istoj konigas al eksterlandaj homoj nian literaturan trezoron.

Lastatempe nigra nubo pendas super nia terĝlobo. La imperiismaj, militarismaj kaj reakciaj fortoj sin armis fobere por plej danĝeraj nuklearmiloj, kreas agresajn militfa-

rujojn, organizas kaj provokas streĉan kaj dangeran situacion en Okcidenta Eŭropo, en tuta Suda Azio kaj en Afriko. La popoloj de Afganistano kaj Irano, Palestino kaj Libano, Vjetnamio kaj Kampučio, Kubo kaj Nikaragvo estas minacataj de agreso. Ĉiu pacama bulgara e-isto, organizita aŭ neorganizita en BEA, apartenanta aŭ neapartenanta al la Mondpaca Esperantista Movado, konsideras kiel sian plej gravan taskon kontribui laŭ siaj fortoj kaj ebloj por la evitigo de tutmonda nuklea katastrofo, por sereniĝo de la ĉielo super nia belega planedo.

LA PACO ESTAS NIA KOMUNA BONO

Fine de aprilo, kiel sciante, en Parizo okazis renkontiĝo de la eŭropaj komunistaj kaj laboristaj partioj. En tiu renkontiĝo estis aprobita gravega alvoko, kies tekston ni donas ĉi-sube.

ALVOKO

DE LA KOMUNISTOJ AL LA POPOLOJ DE LA EŬROPAJ LANDOJ PRI PACO KAJ MALARMADO

La senprudenta akcelo de la vetarmado vekas maltrankvilon ĉe vi.

Popoloj de la eŭropaj landoj, vi pravas esti streĉe atentemaj.

Amasigi en nian tiel dense loĝatan kontinenton aŭ direkta kontraŭ ĝin rimedojn de neniigo kaj morto estas granda danĝero por nia komuna sorto. Vi scias ankaŭ, kia monstra malsparado ekzistas, kiajn grandegajn monrimedojn oni perdas anstataŭ uzi ilin por kontentigi la ĉiutagajn bezonojn de la popoloj kaj nacioj de Eŭropo kaj ties estonta disvolvigo. Vi vidas, kian grandegan malutilon kaŭzas al la paco, sereniĝo, reciproka fido kaj internacia kunlaborado la komencita dum la lasta tempo militpsikozo, per kiu oni celas restarigi „la malvarman militon“.

En la koro de Eŭropo oni projektas dislokigi novajn nuklearmilajn arsenalojn; oni entreprenas novajn provojn neniigi la fruktojn de la sereniĝo; malkaŝe oni agas kontraŭ jam ekzistantaj interkonsentoj, okazantaj traktadoj, ekonomiaj kulturaj, sportaj kaj homaj ligoj.

La popoloj de nia planedo pagis kare por ekoni la veran prezon de la paco, de la daŭra kaj forta amikeco kaj kunlaborado. La 35a datreveno de la venko super la hitlerismo helpas eksenti pli bone, ĝis kia grado la paco estas unu el la plej gravaj rajtoj de la homo, necesa homa bono.

Ĉiuj ni, kiuj konstruas nian vivon en iu el la eŭropaj landoj, povas perdi ĉion pro tiu danĝera eskalado. Ni forigu la eblecon mem pri pereado de tiu ĉi parto de la mondo, kies konsiderinda homa kaj ekonomia potencialo estas necesa al la tuta homaro, ni defendu ĝiajn naturajn, kulturajn kaj historiajn riĉaĵojn, kiuj estas parto de la tuthomara heredaĵo sur la tero.

Kiuj ajn ni estas kaj kie ajn ni vivas en Eŭropo, ni povas nur gajni el la solvo de la ekzistantaj problemoj per traktadoj. Ni povas nur gajni el la redukto de la armilaro kaj la armitaj fortoj, el la atingo de progreso sur la vojo de malarmado, kiu respondas al la postuloj pri egala kaj garantiita sekureco por ĉiuj ŝtatoj kaj popoloj. La fortoj por atingi tiujn celojn ekzistas.

Ni, la komunistoj, estas batalantoj por paco, ni volas malarmigon, kunlaboradon kaj amikecon inter

La bulgaraj e-istoj estis ĉiam konsekvencaj batalantoj por daŭra paco, por homaro sen militoj. Ĉiu plia alinacia korespondamiko, familio aŭ kolektivo, varbita por la nobla pacbatalo, estas grava kontribuo por stabiligo kaj konservo de la monda paco.

En la antaŭvespero de la 40a jubilea kongreso de la Bulgara Esperantista Asocio — la plej granda landa kongreso en la historio de la tutmonda E-movado, la vastigo kaj intensigo de la pacbatalo estas la plej grava servo, kiun la bulgaraj e-istoj volas fari al nia kara patrolando. Tion ili entuziasme faris ĝis nun. Ĝin ili fidele faros ankaŭ estonte.

la popoloj. Tial ni diras: la paco estas nia komuna afero, kaj nia komuna batalo povas certigi triumfon de tiu afero.

Do kune:

— Ni batalu por esti nuligita la decido de NATO pri produktado kaj dislokigo de novaj usonaj raketoj en Eŭropo aŭ reale estu haltigita la efektivigo de tiu decido, por ke komenciĝu en la kondiĉoj de egaleco kaj egala sekureco utilaj traktadoj pri la raketoj de meza radiuso de efiko.

— Ni batalu por rapida ratifiko de la kontrakto SALT-2 kaj por daŭrigo de la traktadoj pri plua redukto de la strategiaj armiloj.

— Ni batalu por decida progresigo de la Vienaj Traktadoj kaj por redukto de la armitaj fortoj kaj armilaro, ni subtenu ĉiujn aliajn rimedojn tiudirekte, inkluzive rimedojn pri kreo de zonoj en nia kontinento, en kiuj ne estu nukleararmiloj kaj kiuj havu garantian, ke tiuj armiloj ne estos uzataj kontraŭ ili.

— Ni batalu, ke en 1980 estu kunvokita en Madrido konferenco pri sekureco kaj kunlaborado. Ni starigu la celon, ke ĉiuj ŝtatoj ĉiam pli komplete plenumu ĉiujn postulojn de la Fina Akto de la Konferenco en Helsinko, aparte la postulon pri firmigo de la politika malstreĉeco per milita.

— Ni klopodu, ke en Varsovio estu kunvokita tuteŭropa konferenco pri malstreĉeco kaj malarmado.

— Ni insistu, ke estu plenumitaj la decidoj de la Speciala Sesio de UNO pri malarmado.

— Ni batalu, ke la (tiumaniere liberigitaj) rimedoj estu uzataj por disvolvigo kaj batalo kontraŭ la malsato, kiel tion proponas la neengagitaj landoj. Tio estas en intereso de la tuta homaro.

Jes, la batalo por malarmado hodiaŭ estas unuagrada demando!

Ni, la komunistoj el ĉiuj eŭropaj landoj, estas pretaj por ĉiaj traktadoj kaj por ĉiaj komunaj agoj, kiam temas pri batalo por paco kaj malarmado. Ni volas, ke ĉiuj pacamaj fortoj unuigu sin por atingi tiun celon. Kiuj ajn estas niaj naciecoj, niaj mondkonceptoj kaj vivmanieroj, ni deklaras antaŭ ĉiuj vi — komunistoj, socialdemokratoj, kristanoj kaj homoj de aliaj konfesiaj:

„La paco estas nia komuna bono.“

Ni, kiuj kolektigis en tiu ĉi renkontiĝo, esprimas nian strebado al malkaŝa iniciativo, kiu garantiu plej vastajn kontaktojn kaj plej largan dialogon. Ni estas pretaj fari konsultigojn en ĉiaj akcepteblaj formoj kaj interŝangi opiniojn kun ĉiuj fortoj en Eŭropo, kiuj decidis agi en la spirito de Helsinko kaj konsidere al la renkon-

tigo en Madrido por daŭrigi la politikon de malstreĉeco kaj trovi vojon al redukto de la armiloj en nia kontinento.

Viroj kaj virinoj de bona volo, ni agu kune en ĉiu lando kaj en tuta Eŭropo!

Se ni estos kune tenataj, la afero de la progreso, feliĉo kaj paco venkos.

Parizo, 29 de aprilo 1980

Nia intervjuo

NI ESTAS ARMILFRATOJ

En la 13a konsultigo de E-organizaĵoj el socialismaj landoj partoprenis dumembra delegitaro el Vjetnamio, gvidata de k-do Vu Kan, ĵurnalisto, komitatano de VPEA. Por la legantoj de „BE“ li estis afabla respondi al kelkaj demandoj, starigitaj de nia redakcio.

DEMANDO. K-do Kan, bonvolu per kelkaj vortoj rakonti pri la E-movado en Vjetnamio.

RESPONDO: Jam dum la franca kolonizado la idealo de Zamenhof havis adeptojn en Vjetnamio, sed E-movado en nia lando fakte ekzistas nur ekde la fongido de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio (VPEA) en Nord-Vjetnamio en 1956. VPEA estas sekcio de MEM. Tiutempe nia lando estis dividita, kaj en la sudo, sub la usona novkoloniisma reĝimo, agadis eta esperantistaro, kies organizaĵo estis membro de UEA. En la nordo nia asocio disvolvis intensan aktivecon, organizante multajn E-klubojn kaj kursojn. Preskaŭ 2500 homoj lernis E-on. Kune kun la fremdlingva eldonejo en Hanojo ni eldonis la revuon „Vjetnamio antaŭenmarŝas“, kiu aperadis ĝis 1963, kaj ĉ. 80 librojn kaj libretojn, tiel kontrbuante aktive al la batalo de nia popolo kontraŭ la usonaj agresuloj kaj ties vjetnamaj pupoj por kompleta liberigo kaj unuigo de nia tuta patrolando. La vjetnama esperantistaro de nordo kaj sudo estas nun reunuigita. Sed pro la seninterrompaj militoj kaj ties longedaŭraj sekvoj niaj kluboj kaj kursoj ne funkcias regule. Ni tamen daŭre eldonas librojn en servo al la paco kaj socialismo en nia lando kaj en la mondo. En 1979, kune kun la periodaĵo „Vjetnama Kuriero“, ni publikigis la libron „Kampučeo: la nigraj jaroj“ kaj ĉi-jare ni publikigos kvar aliajn: pri la Vjetnama Socialisma Respubliko, pri la ĉinaj-vjetnamaj rilatoj dum la lastaj 30 jaroj, pri Ho Si Min kaj pri Nguen Trai, nia granda nacia poeto kaj humanisto, kies 600a naskiĝdato estos celebrata en 1980 sub la aŭspicio de la Monda Konsilio de la Paco.

DEMANDO: Kiel la e-istoj de Vjetnamio partoprenis la batalon de la vjetnama popolo por libereco kaj sendependado? Kiel ili partoprenas la restarigon de la lando nun, post la agresoj de la usonaj imperialistoj kaj la ĉinaj hegemonistoj?

RESPONDO: Kiel sciante, nia popolo suferis pro la milito ekde 1939, kiam Vjetnamio, tiutempe franca kolonio, devis partopreni en la Dua Mondmilito kune kun la metropolo. De 1941 ĝis 1945 ni batalis kontraŭ la japanaj faŝistaj okupantoj, el kies manoj ni konkeris nian sendependecon en 1945. La francaj koloniistoj tamen tuj sendis kontraŭ ni grandan ekspedician armeon, kiun ni venkis nur post naŭjara batalo. Nelonge post tio eksplodis la usona agresmilito, kiu efektive daŭris 15 jarojn — de 1960 ĝis 1975. Dum tiu milito la Pentagono disŝutis sur nian teritorion 15 milionojn da bomboj kaj obusoj, egalvaloroj al 750 hiroŝimaj bomboj, nekalkulante 100 000 tunojn da kemiaj toksaĵoj por lukti kontraŭ la gerilo en Suda Vjetnamio. Tiuj kemiaj toksaĵoj detruas la vivmedion kaj havas teruran efikon sur la homan organizon, kaŭzante kanceron,

abortojn, nenormalan akuŝon, aberacion de la kromosomoj.

Malfeliĉe, tuj post la kompleta liberigo de nia patrolando la kliko de Pol Pot-Jeng Sari en Kampučio, ordonita de Pekino, okazigis kontraŭ Vjetnamio nedeklaritan militon de majo 1975 ĝis januaro 1976, sed la spino de la agresra ruĝkmera armeo estis frakasita.

Fine okazis la agresmilito de Pekino mem (17a februaro ĝis la 16a marto 1979). Dum ĝi de la ĉinaj invadintoj estis detruitaj 4 urboj, 320 komunumoj, 735 lernejoj, 428 hospitaloj kaj medicinsanitaraj postenoj, multaj industristaj entreprenoj, konstruitaj dank' al la helpo de Sovetunio, Bulgario kaj aliaj frataj socialismaj landoj.

Nia esperantistaro partoprenis la lukton de la tuta popolo kaj spertis kun ĝi ĉiujn malfacilaĵojn kaŭze de la milito. Ni aparte klopodis informi la mondan esperantistaron pri la situacio en nia lando kaj denunci la krimojn de la agresuloj.

DEMANDO: Kia estas la rilato de la vjetnama popolo al la bulgara? Kion vi povas bondeziri al la bulgara popolo kaj la bulgaraj e-istoj?

RESPONDO: Bulgario kaj la Germana Demokratia Respubliko proporcie al sia loĝantaro donas al ni la plej grandan subtenon. La socialisma mondo havas nevenkeblan citadelon — Sovetunion. Bulgario estas ĝia nevenkebla posteno en la Balkana Duoninsulo, kaj Vjetnamio — en Sudorienta Azio. Ni estas armilfratoj.

Ni tre ĝojas, ke la socialismo firme antaŭenmarŝas en Bulgario. Vi estas farintaj mirindaĵojn, des pli ke vi antaŭ nelonge estis la plej malriĉa lando en Eŭropo. Via popolo vivas feliĉe kaj la bulgara E-movado estas unu el la plej fortaj en la tuta mondo. Ni sincere deziras al la frata bulgara popolo kaj al la bulgara esperantistaro multe da novaj sukcesoj.

Intervjuis K. V.



Vu Kan en kunveno de la sofiaj e-istoj.

La bilanco estas teruriga: nur por 3 jaroj, 8 monatoj kaj 20 tagoj rezulte de unika en la mondo genocido efektivegita de la sangvida bando de Pol Pot kaj liaj ĉinaj «konsilantoj». Kampuĉio perdis preskaŭ la duonon de sia loĝantaro. Hodiaŭ la kampuĉianoj diras: «Dubinde, ĉu Hitler estis la pl'j terura el la ekzekutistoj. Li okupas la duan lokon post Pol Pot.» Antaŭ kelka tempo en nia lando gastis delegitaro de la Ruĝa Kruco de Kampuĉio: Fleš Firun, prezidantino, kaj d-ro Mi Samedi, ĝenerala sekretario. Interjuon de ili prenis la ĵurnalistino Donka Jolova.

Jen kion s-ino **Fleš Firun** rakontis pri sia sorto dum la reĝimo de Pol Pot:

— Gis la 17 de aprilo 1975 mi estis la prezidantino de la Ruĝa Kruco de Kampuĉio. La vesperon de tiu tago la soldatoj de Pol Pot invadis la sidejon de la Ruĝa Kruco. En tiu momento mi kaj mia kolego preparis la nomarojn, laŭ kiuj la sekvan tagon ni devis distribui inter la fuĝintoj la ricevitajn helpojn. La soldatoj forpelis nin el la sidejo de la Ruĝa Kruco. Mi estis devigita pasigi la nokton sur la trotuaro. La sekvan tagon, disigita de mia familio, kune kun multaj aliaj homoj mi devis forlasi la urbon kaj traŝi piedo centojn da kilometroj. Oni forkondukis nin al tre malproksima regiono. Mia vivo similis veran inferon. Mi devis kaŝi mian nomon. Al la homoj de Pol Pot mi diris, ke mi estas analfabeta. Oni destinis min al punlaboro, dum la tuta tempo duonmalsata. Mia vidkapablo malfortiĝis, mi jam apenaŭ povis vidi, sed portis okulvitrojn mi ne kuraĝis, ĉar la soldatoj de Pol Pot turmentis tiujn, kiuj havis okulvitrojn, mi mem vidis, ke ili mortigas tiujn homojn. Feliĉe min ne trafis la morto. Sed mia sano estis detruita, post la liberigo mi apenaŭ havis fortojn, por reveni al la ĉefurbo. Por tio mi devis marŝi kelkcentojn da kilometroj, nudpieda, ĉar ŝuoj mankis, ĉifonvestita.

D-ro Mi Samedi rakontis pri la nuna stato de la sanprotekto en Kampuĉio:

— Gis la alveno de la soldat-trupoj de Pol Pot en Pnom Pen ni havis medicinan kaj farmacian

fakultatojn, stomatologian instituton, mezlernejon por flegistinoj kaj akuŝistinoj. En la tuta lando estis 35 hospitaloj kaj 350 poliklinikoj. En la medicina fakultato laboris 19 profesoroj. En la lando estis ankaŭ 500 kuracistoj, 80 farmaciistoj, 100 stomatologoj kaj 100 studentoj de medicino.

La 17an de aprilo la soldatoj de Pol Pot forpelis ĉiujn el la hospitalo — profesorojn, kuracistojn, studentojn, malsanulojn. Oni ekzilis nin en foraj regionoj de la lando. Tiam oni komencis ekstermi la militistojn, juristojn, instruistojn. La kuracistojn oni lasis duale. Nia vico venis 3—4 monatojn post la unua masakro. En la vilaĝo, kie mi laboris, ni estis kvar kuracistoj — unu internisto, la dua militkuracisto, la tria — respondeculo pri la sanprotekto fare de la budista pastraro. Mi estis rentgenologo. Krom mi ĉiujn tri kuracistojn oni mortigis. Mi estis lasita, ĉar mi devis instrui analfabetajn kuracistojn, nomatajn „nudpiedaj kuracistoj“, kiajn la reĝimo de Pol Pot preparis. Dum tiuj kvar jaroj de la reĝimo ni estis devigataj fari punlaboron. Dum la tuta tempo mi havis nenian informojn pri la stato de la lando. Laŭ la alvoko de la Nacia Fronto por liberigo de Kampuĉio mi revenis la ĉefurbon. Gis nun ni sukcesis registri nur 54 kuracistojn el 500, 12 farmaciistoj el 80, 15 stomatologoj el 100, 350 flegistinojn kaj akuŝistinojn el 7000 kaj entute 60 studentojn de medicino el ĉiuj kursoj.

Antaŭ la 17a de aprilo 1975 ĉiuj hospitaloj estis bone ekipitaj.

Funkciis la hospitalo de la soveta kampuĉia amikeco, kies vicdirektoro mi estis. Estis alia hospitalo, gvidata de francaj kuracistoj, kaj tria, nomata Hospitalo de la Respubliko. Post nia reveno ni trovis ilin plene dezertigitaj: oni uzis ilin kiel deponejojn, ili estis plenaj de diversaj defalaĵoj. La tuta hospitala ilaro kaj membroj estis neniigitaj, la litoj kaj la medikamentoj mankis. En la medicina fakultato la tuta medicina literaturo kaj lernolibroj estis forbruligitaj aŭ disŝiritaj.

El la restintaj 4 milionoj da homoj en la lando 70% havis detruitan sanstaton. La longtempa malsatado kondukis al malfortigo de la organismo kaj intelekto de la homoj. En tiu ĉi terura situacio ni, la restintaj 54 kuracistoj, komencis fari nian grandegan restarigan laboron, petante helpojn, ĉefe pri medikamentoj, precipe el la amikaj landoj.

Ni sukcesis malfermi unu mezgradan lernejon por 350 flegistinoj kaj akuŝistinoj. Sed vi ne povas imagi, ke en tiu lernejo ni bezonas ĉion, eĉ kreon kaj paperon. En la hospitaloj, kiuj nun funkcias, estas nur litoj, sen matracoj kaj dormokovriloj. Mankas stetoskopoj, eĉ termometroj. Sed per streĉaj klopodoj, paŝo post paŝo, venkante neimageblajn malfacilaĵojn, ni iras antaŭen. Ni adresas nin al ĉiuj naciaj societoj de la Ruĝa Kruco en la amikaj landoj kun la varma peto helpi nian multsuferintan popolon.



EL LA E-VIVO EN VARNO

La 19 an de aprilo en restoracio „Pliska“ la membroj de E-Societo „Albatroso“ aranĝis belan printempan amuzvesperon. La gastoj estis agrable surprizitaj jam ĉe la pordo, kie bonvenigis ilin du junaj e-istinoj. La prezidantino de „Albatroso“ Venelina Angeleva bonvenigis ĉiujn kaj bondeziris bonan humoron. La vespero komenciĝis per la komuna kanto „La verda stel“. S-anino Anna Efimovna plenumis kelkajn siajn (teksto kaj muziko) E-kantojn.

Okazis ankaŭ tombolo kaj kvizo pri la historio de la E-movado. La agrabla kunesto daŭris ĝis noktomezo per kantoj, dancoj, amikaj interparoloj.

Semajnon poste la societanoj solene celebris la naskiĝtagon de Lenin. Ceestis ankaŭ amikoj de E-o. Sed plej karaj gastoj estis du kamaradoj el Vjetnamio. Post la festparolado doc. G. Dimov projekciis belegajn diapozitivojn pri la UEA-kongreso en Rejkjaviko, Varno, Lucerno. Post li oni donis la parolon al k-do Vu Kan el Hanoj. Li informis nin pri la politika situacio kaj E-movado en Vjetnamio. La vjetnamaj gastoj donacis E-librojn al nia societa biblioteko.

La enhavoriĉa, klara kaj facile komprenebla parolado de k-do Kan estis konvinka pruvo, ke E-o estas bonega lingva helpilo. En la internacia vivo ĝi povas doni multon pli ol ĉiu nacia lingvo.

Saša NEDEVA

LA ANTAŬKONGRESA KONKURADO

La periodo de la antaŭkongresa konkurado jam finiĝos, kiam vi legos nian laŭvican bilancon. Ĝi estas lasta sur la paĝoj de „Bulgara Esperantisto“. Pri la fina stato ni informos per konvena maniero la kongresanojn de nia 40a kongreso, kaj en iu kunsido ni anoncos solene la venkintojn. La nomoj de la venkintoj aperos sur la paĝoj de la postkongresa numero de „BE“.

UNUA KONKURGRUPO

(La E-societoj en la distriktaj urboj plus
5 s-etoj en aliaj urboj)

Gradigo	Loĝloko	Societo	Poentoj
1.	Ruse	„Libero“	550
2.	Sofio	„M. Gorkij“	289.5
3.	Jambol	„M. Gorkij“	240
4.	Plovdiv	„Kulturo“	184.5
5.	Kubrat	„Progreso“	143
6.	Gálábovo	„Kolombo de la Paco“	127
7.	Pleven	„Eterna Amikeco“	119
8.	Pazarĝik	„Radio“	115
9.	Kazanlák	„Roza Valo“	113
10.	Trojan	„Balkana Stelo“	97
11.	Gabrovo	„Verda Torĉo“	57.5
12.	Ŝumen	„Vekigo“	50.5
13.	Burgas	„Nigra Maro“	41
14.	Stara Zagora	„Verda Stelo“	39.5
15.	Vraca	„Sukceso“	34
16.	Ĥaskovo	„Asen Zlatarov“	32.5
17.	Pernik	„Nova Vojo“	30.5
18.	Tárgovište	„Verda Eskadrono“	30
19.	Loveĉ	„Espero“	29
20.	Varna	„Albatroso“	28
21.	Kárgali	„Stelo“	18
22.	Kjustendil	„Flamo“	13
23.	Vidin	„Espero“	13
24.	V. Tárnovo	„Lumo“	12.5
25.	Dimitrovgrad	„G. Dimitrov“	11.5
26.	Sliven	„Espero“	10
27—28.	Smoljan	„Kulturo“	3
	Tolbuhin	„Paco“	3
29.	Blagoevgrad	„Espero“	2.5
30.	Razgrad	„L. L. Zamenhof“	2

DUA KONKURGRUPO

E-societoj en la ceteraj loĝlokoj
kaj laŭ profesio

1.	Velingrad	„Stoju Kalpazanov“	394.5
2.	P. Trámbeš	„Progreso“	169
3.	Drjanovo	„Ivan Vladkov“	55
4.	Ĉepelare	„Diĉo Petrov“	42.5
5.	Sofio	„Heroldo“ — poŝtistoj	39
6.	Orjahovo	„Georgi Stanev“	33.5
7.	Sofio	„fr. Botev“ — fervojistoj	29
8—10.	Pomorie	„Trifon Ĥristovski“	28
	Popovo	„Homeco“	28
	Sofio	„L. L. Zamenhof“ — medicinistoj	28
11.	Nova Zagora	„Edmon Priva“	26.5
12.	Karlovo	„Vasil Levski“	26
13—14.	Ruse	„Ponto de l'Amikeco“ — fervojistoj	23.5
	Sofio	„Progreso“ — fervojistoj	23.5
15—16.	Pavel Banja	„Supreniro“	22
	Svišov	„Danuba Stelo“	22
17.	Bjala	„Paco“	21
18.	Botevgrad	„Trifon Ĥristovski“	20
19.	Samokov	„Rila Esperantisto“	19
20.	Sofio	„Diĉo Petrov“ — instruistoj	18.5
21.	Asenovgrad	„David Sasonov“	18
22—23.	Bansko	„Pirinmontaro“	17
	v. Dálboki	„Marko Ivanov“	17
24.	Rila	„Libero“	16.5

25—26.	Dospat	„Fajrero“	16
	Provadia	„Oveĉ“	16
27.	Stanke Di- mitrov	„Marek“	15
28.	v. Momina	„Leono“	13
	Klisura	„Lumo“ — blinduloj	12
29.	Plovdiv	„Ondo“	10
30—34.	Ajtos	„Vilaĝa Voĉo“	10
	v. Batišnica	„Mondpaco“	10
	Ĉirpan	„Kamaradeco“	10
	Etropole	„Nova Stelo“	10
	Panagjurište	„Amikeco“	9
35.	Svoĝe	„L. L. Zamenhof“	7.5
36.	Dve mogili	„Mondpaco“	7
37.	Karnobat	„Trakia Lumo“	6.5
38—39.	Marica	„Petko Simeonov“	6.5
	Nikopol	„Espero“	3
40.	G. Orjahovica	„Fervojisto“	2
41.	Stara Zagora	„Verda Stelo“	1
42—49.	Berkvica	„Fervojista Impeto“	1
	G. Orjahovica	„Progreso“	1
	Isperih	„Aŭroro“	1
	Koĉerinovo	„Bjalistok“	1
	Madan	„Septembra Gloro“	1
	Mágljij	„Bratan Šukerov“	1
	Smoljan,	„Verda Standardo“	1
	kv. „Ustovo“	„Aŭroro“	0.5
	Trjavna		
50.	Septemvri		

TRIA KONKURGRUPO

(Junularaj, studentaj, lernejanaj societoj
kaj grupoj)

1.	Vidin	Junulara grupo ĉe s-eto „Espero“	83
2.	Plovdiv	„Studenta Impeto“	30
3.	Sofio	„Vasil Levski“ — junulara	24
4.	Sofio	„Vela Peeva“ — studenta	22
5.	Preslav	„L. L. Zamenhof“ — lernejana	17
6.	Vraca	„Verda Raketo“ — lernejana	14
7.	Smoljan	„Flugo“ — studenta	2
8—9.	Ruse	„Verda Stelo“ — lernejana	1
	V. Tárnovo	„Flamo“ — studenta	1

KVARA KONKURGRUPO

(Uzinaj kaj oficejaj societoj)

1.	Preslav	„Ivan Kándeŭ“ — uzina	26.5
2.	Ŝumen	„Progreso“ — uzina	9
3.	Sofio	„48-a Universala Kongreso“ — uzina	6
4.	Varno	„Fajrero“ — oficeja	4

KVINA KONKURGRUPO

(Asociaj sekcioj)

1.	Instruista	24
2.	Literatura	16
3.	Fervojista	14
4.	Poŝtista	4
5.	Jurnalista	4
6.	Filologa	2

KUN LA POPOLAJ LEGEJOJ

Plenumante la subskribitan kontrakton inter E-Societo „Verda Stelo” kaj la Modela Popola Legejo „Rodina” (Patrolando) en Stara Zagora, je la 29a de aprilo ni malfermis senpagan kurson de E-o por komencantoj, kiun partoprenis 30 lernantoj kaj civitanoj.

La kurson oni okazigas en la lingva kursejo de la legejo. La legejo pagas ĉiujn elspezojn — por aliŝoj kaj ties disgluado tra la urbo, honorarion al la lektoro. Kursgvidanto estas Elena Zločevska — sekretariino de la E-societo.

Do, ankaŭ ĉe ni evidentiĝas jam la bonaj rezultoj de la kuna agado inter ni kaj la popola legejo.

Slavi JANULOV

Je la 21a de majo en la salono de Popola Legejo „Bačo Kiro” en Sofio, E-societo „Heroldo” organizis festan kunvenon okaze de la 24a de majo — Tago de la bulgara klereco kaj kulturo, de la slava literaturo kaj la bulgara gazetaro. Ĉeestis multaj e-istoj, inter kiuj la membroj de la CE de BEA Nikola Aleksiev, Kunčo Vălev, Hristo Kanev. Gastoj de la kunveno estis ankaŭ M. Raškova — prezidanto de Legejo „Bačo Kiro”, membroj de la legeja estraro kaj membroj de la legejo.

Je la nomo de la legejo la solenan kunvenon malfermis St. Denčeva. D-ro Moraresku, instruanto de E-o, disdonis diplomojn al la finstudintoj de la E-kurso ĉe la legejo. K-do K. Vălev faris mallongan paroladon pri la epokfaranta afero de la du slavaj apostoloj — la fratoj Kiril kaj Metodij, kreintoj de la slava alfabeto, pri ilia grandvalora kontribuo al la slava literaturo kaj por la tuthomara progreso. Li salutis la manifestiĝon de kunlaboro inter E-societo „Heroldo” kaj Legejo „Bačo Kiro” kaj esprimis la esperon, ke ĝi daŭros en la estonteco ankoraŭ pli aktive kaj fruktodone.

Pri la afero de la sanktaj fratoj perolis ankaŭ k-ĉino Radka Rujanova.

Fine de la solenaĵo sur la scenejo ekstaris junpionira esperantista kantgrupo, laŭreato de la Nacia Revuo de la E-Parolo kaj Kanto en Loveĉ. La kantgrupo plenumis rican belantan programon. Lernantoj el la muzika studgrupo ĉe Legejo „Bačo Kiro” ankaŭ partoprenis en la artprogramo.

Stoja DENČEVA

LA BULGARAJ BLINDAJ ESPERANTISTOJ JAM LEGAS NIAN REVUON

Laŭ iniciato de la bulgaraj blindaj e-istoj la surbendigejo de la Centra Konsilantaro de la Asocio de Blinduloj en Bulgario jam komencis surbendigi la organon de BEA „Bulgara Esperantisto”. Estas produktataj po 10 sonbendoj, kiuj estas dissendataj al ĉiuj fonotekoj de la Asocio en la lando. Tio estas grava akiraĵo, per kiu realiĝas delonga revo de la blindaj e-istoj ĉe ni.

Vladimir Jeleu



SINCERA INTERPAROLO

LA PRIAGADA KAJ ELEKTA KONFERENCO DE BEA EN SOFIO

En la streĉa antaŭkongresa aktivado de la sofiaj e-istoj apartan lokon okupis la priagada kaj elekta konferenco de la distrikta kaj urba organizaĵoj de BEA. La graveco de tiu evento elstaras ne nur pro la fakto, ke la ĉefurba organizaĵo de la bulgaraj e-istoj okupas fruntan lokon en la vicoj de BEA kaj pro la fakto, ke la konferenco partoprenis ĉ. 100 delegitoj el ĉiuj E-societoj el Sofio kaj ĝia distrikto frunte kun la plej granda E-societo en la lando „Maksim Gorkij”, sed ankaŭ pro la graveco de la problemoj, kiuj estis diskutataj. La konferenco estis sincera interparolo ne nur pri la sukcesoj de la E-movado en Sofio kaj ĝia distrikto, sed ankaŭ pri ĝiaj mankoj kaj malfortaj flankoj, pri la malfacilaĵoj, kiuj devas esti venkitaj.

Detalan kaj analizan raporton pri la agado dum la pasinta periodo legis la prezidanto de la Distrikta Urba Estraro de BEA Hristo Kanev. Li priskribis la organizan staton de la E-societoj en la ĉefurbo („Maksim Gorkij” — urba, „Heroldo” — poŝtista, „Dico Petrov” — instruista, „Progreso” — fervojista, „D-ro Zamenhof” — medicinista, „Vasil Levski” — junula, „Vela Peeva” — studenta, „Hristo Botev” — transporta, „48a kongreso de UEA” — uzina, „Balkana stelo” — blindula, k.a.) kaj en la distrikto („Rila Esperantisto” — Samokov, „Amikeco” — Svoĝe, „Kamaradeco” — Etropole, „Trifon Hristovski” — Botevgrad k.a.).

Dum la raportita periodo spuron lasis la amasaj manifestadoj de la e-istoj lige kun la liberigo de Bulgario, la tradiciaj ĉiujaraj renkontiĝoj de la e-istoj el Sudokcidenta Bulgario en u. Samokov, la celebriĝoj de gravaj naciaj festoj kaj eventoj, la celebriĝoj de meritaj e-istoj, la renkontiĝo kun la 105 sovetaj e-istoj, venintaj por la 63a UK de E-o en 1978, la komencita kunagado kun la popolaj legejoj kaj kulturdomoj, la organizado de pluraj E-kursoj, la eldono de lernolibroj, la bona arango kaj funkciado de la tendarlernejo apud Drujevo k.a.

Kaj tamen la atingito ne kontentigas. Pri malfortaj momentoj en la laboro parolas la fakto, ke la organizaĵo postrestas en la antaŭkongresa konkurado (nesufiĉa kresko de la membraro, mankoj en la instrulaboro, en la abonkampanjo k. a.).

Sekvis raporto de la distrikta kontrolkomisiono, legita de Marin Petkov. Surbaze de la du raportoj okazis viglaj diskutoj, en kiuj partoprenis 26 samideanoj. La varieco, grandeco kaj aktualeco de la tuŝitaj demandoj faris la konferencon utila, krea kaj sincera interparolo pri la plej gravaj problemoj de nia E-movado. Estis substrekitaj gravaj necesoj: ampleksigi nian propagandon per la rimedoj de amasa informado (gazetaro, radio, televido), per produktado de E-suveniroj, magnetofonbendoj k. a.; pli da zorgoj pri la lingva nivelo de la e-istoj, pli granda atento al la instrulaboro (preparo de propraj E-instruistoj, de lerniloj por diversaj aĝoj) k.a.; organiza stabiligo de la societoj kaj sekcioj, kreskigo de la membraro per obstina kaj sistema laboro inter la popolamasoj, aparte inter laboristoj, junuloj, lernantoj, instruistoj (en uzinoj, fabrikoj, entreprenoj, lernejoj, komsomolaj societoj, legejoj, k.t.p.); kunagado kun aliaj amasorganizaĵoj (Patrolanda Fronto, Komsomolo, Sindikatoj, turistaj kaj filatelistaj societoj, kluboj de sobrero, pacdefendaj komitatoj k.a.). La ĉiam viva ekzemplo de la revo-

La estraro de la urba E-societo en Smoljan frunte kun la prezidanto Rumen Bukov pridiskutas la rekomendojn de la jara kunveno.

EL LA VIVO DE E-SOCIETO „AMIKECO“ — SVOGE

Finigis bon sukcese 5-monata elementa kurso de E-o en u. Svoqe sub la gvido de Elena Radenkova, bibliotekistino. Paralele kun la lernado la gekursanoj ĉiunmonate preparis dissendon per la loka radio-reto en la rubriko „Minutoj de E-o“. Sur la fono de E-kantoj sonis novaĵoj pri la vivo de la lokaj kaj nialandaj e-istoj, gratuloj de naskiĝtagoj de e-istoj, E-verkoj originalaj kaj tradukitaj de la gekursanoj. Oni organizis ankaŭ kolektivajn vizitojn de filmoj, teatroj, koncertoj, partoprenon en renkontiĝoj kun e-istoj el la distrikto, viziton al la E-a tendarlernejo apud v. Drujevo k. a.

Honore al la Vrintago la 8a de marto kaj la 110 datreveno de la naskiĝo de Lenin estis preparitaj agittabuloj. Preskaŭ ĉiuj e-istoj abonis diversajn E-periodaĵojn. Multaj jam trovis literamikojn en eksterlando. Oni amase veturos al la 40a jubilea kongreso de BEA en Plovdiv.

Elena RADENKOVA

ESPERANTO — LABORLINGVO DE DU MUZEOJ

En Ruse je la 14—18 de majo okazis „Tagoj de Torun“. La publiko de Ruse havis eblecon vidi ekspozicion de ekspozitaĵoj el la etnografia muzeo de u. Torun (Pollando).

Laŭ iniciato de Tereza Nemer, aranĝanto en tiu muzeo, kaj Stojko Cankov — prezidanto de la Komisiono pri Internacia agado de DE de BEA en Ruse, estis proponita, ke E-to estu laborlingvo en la ligoj inter la etnografia muzeo de Torun kaj la historia muzeo en Ruse. La direktoroj de ambaŭ muzeoj aprobis la proponon. Tio estas imitinda sukceso.

St. CANKOV

ATENTU! GRAVA!

La 12-an de oktobro 1980 E-Societo „Radio“ en u. Pazarĝik, celebros solene sian 70-jaran jubileon. Lige kun tio oni anoncas grandan E-ekspozicion. Bonvolu sendi amase el ĉiuj landoj bildkartojn, bele afrankitajn leterojn, E-afisojn, librojn, flagetojn, insignojn, glumarkojn, tukojn k. a. esperantaĵojn, por ke nia ekspozicio estu interesa kaj varia kaj ni lar suksesan propagandon de E-o.

Ni atendas varman internacian subtenon!
Ĉion sendu al: Esperanto-Societo „Radio“, str. Gurko 3-a, 4400 Pazarĝik, Bulgario.

lucia pasinteco devas inspiri la bulgaraĵojn e-istojn nun al persista laboro, al batalo kontraŭ la formalismo, por rompi sian propran konkon, sian izolitecon.

Grandan atenton en la diskutado oni donis al la demandoj de la internacia kunlaboro, al la neceso uzi E-on por vaste informi tra la mondo pri la sukcesoj de nia socialisma patrolando, pri la florado de nia nacia kulturo, literaturo kaj arto, pri la pacamo de nia popolo kaj sincera pacpolitiko de nia Popola Respubliko, pri Bulgario kiel alloga objekto de la internacia turismo k. a.

Estis substrekitaj la neceso mobilizi ĉiujn fortojn por bonege prepari kaj okazigi la jubilean 40an kongreson de BEA en Plovdiv.

Oni elektis novan gvidorganon de la distrikta kaj urba organizaĵoj, kontrolan komisionon, delegitojn por la kongreso. Estis reelektitaj kiel prezidanto de la DUE Hr. Kanev kaj sekretario Marin Marinov.

La konferenco de la e-istoj el Sofia kaj la sofia distrikto estis manifestado de forto, de profunda kompreno de la aktualaj taskoj kaj de decidemo labori entuziasme, persiste kaj sisteme por bonega solvo de tiuj taskoj.

Haim LEVI

PILGRIMO AL LA TOMBO DE TRIFON HRISTOVSKI

Je la 25a de majo grupo da sofiaĵe-istoj, inter kiuj ankaŭ gvidantoj kaj aktivuloj de BEA kiel Nikola Aleksiev, heroo de la socialisma laboro, Nano Kjuĉukov — vicprezidanto de BEA, Hristo Kanev — prezidanto de la Sofia DUE de BEA, Dimitro Haĝiev — prezidanto de la Bulgara MEM-Komitato, Dimitro Denĉev — redaktoro de la bulgarlingva bulteno „Informoj pri la Internacia lingvo E-o“, k. a., amikoj kaj adorantoj de Trifon Hristovski (24. 1. 1905 — 17. V. 1944) — elstara bulgara prolet publicisto, verkisto, arda komunisto, eminenta e-isto kaj granda patrioto-internaciisto, pilgrimis al ties tombo en lia naskiĝvilaĝo Radolina, regiono de Botevgrad. Al la grupo aliĝis la prezidanto de E-Societo „Trifon Hristovski“ en u. Botevgrad k-do Mitrofan Velelev — ĉefredaktoro de j. „Botevgradski Plamak“ (Botevgrada flamo). Ĉeestis la pilgrimadon ankaŭ la frato de Trifon — Dimitro Hristovski.

Sur la tombon estis metitaj florkronoj je la nomo de la Centra kaj Sofia Distrikta-Urba Estraroj de BEA, kaj je la nomo de la franca e-isto Jean (Jan) Lezan, korespondamiko de Hristovski, laŭ ties peto. Sur la rubando de la florkrono estis skribitaj esperantlingve la vortoj: „Al Trifon Hristovski — je la nomo de lia franca amiko kaj kunbatalinto Jan Lezan“.

Antaŭ la tombo k-do N. Aleksiev, persona amiko de Hristovski, kortuŝe parolis pri lia loko en la tiama politika kaj kultura vivo de nia lando kaj pri liaj kontaktoj kun eminentaj bulgaraj literaturistoj kaj publicistoj kiel Georgi Bakalov ka. D. Haĝiev tra legis en bulgarlingva traduko interesan leteron de Jan Lezan kaj recitis en esperantlingva traduko la versajon de la poeto de la socialisma konstruado Penjo Penev „Lia Plejmoŝto la Homo“. D. Denĉev recitis sian originale verkitan versajon en E-o, dediĉitan al Hristovski.

Poste la grupo vizitis la naskiĝdomon-muzeon de Trifon Hristovski kaj trarigardis la muzean kolekton, konsistantan el diversaj aĵoj, libroj (inter kiuj ankaŭ en E-o), gazetojn, fotojn kaj korespondadojn. Tie ĉi k-do Aleksiev rakontis detalojn kiel li instigis Hristovski verki sian lastan libron „Mia vivo“.

La pilgrimintoj enskribis en la libron por impresoj jenajn vortojn: „Ni bone memoras nian kamaradon Hristovski kaj neniam forgesos lin“.

La vizito en la domo-muzeo lasas fortan impreson. Oni eliras el ĝi kun la konvinko, ke oni tuŝis la biografion de homo de granda volo kaj kuraĝo, de eksterordinara obstino kaj sciemo, de homo ege modesta kaj altprincipa, senfine dediĉita al la Partio kaj al sia popolo. Forte sonas la vortoj de Hristovski: „... La ĉefaĵo estas ne nur vivi, sed ankaŭ sencoplene vivi. Eĉ duonkadavro mi donus pruvon al la aliaj, ke mi vivas...“

Dimitro HAĜIEV



Ankaŭ ĉi-jare grupo da e-istoj partoprenis la tradicion tritagan turistan marŝon Koprivštica — Oborište. Nun marŝis turistoj nur el Sofio kaj grupo da junaj e-istoj el la plej nova E-societo en Bulgario en u. Botevgrad.

Dum la vojo la partoprenantoj metis kronon ĉe monumenton de la pereintoj en la batalo kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo Hristo Toromanov kaj Ivan Krivalev, ambaŭ el Koprivštica. Nia vojo pasis tra ripozloko Panagjurski Kolonii, kie la marŝantoj dormis.

Vespere la e-istoj el Botevgrad plenumis antaŭ la turista publiko programon el E-kantoj. Tio grave kontribuis al la bona etoso kaj provokis intereson al E-o. Responde al kelkaj demandoj, starigitaj de turistoj, la skribanto de tiuj ĉi linioj tuŝis la problemon pri internacia lingvo kaj rakontis pri E-o kaj ĝia kreinto d-ro Zamenhof. Komenciĝis tute natura kaj bonefika konversacio. Kelkaj el la turistoj deklaris deziron lerni la lingvon. Pro la belarta programo la e-istoj ricevis specialan laŭdon far la turista estraro de la marŝo.

La trian tagon ni metis kronon ĉe la grandan monumenton de la pereintaj antifaŝistoj, troviĝanta en Panagjurski Kolonii.

Malgraŭ la malbona vetero dum la tria tago la marŝo finiĝis sukcese. Kun aparta tremo ni proksimiĝis al la sankta por nia popolo Oborište, kie okazis la Unua Granda Nacia Kunveno, preninta la historian decidan pri la Aprila Ribelo kontraŭ la otomana jugo. Ĉi tie ni metis kronon antaŭ la monumenton de aprilanoj.

Ankaŭ ĉi-jare pro sia bona prezentiĝo la esperantista grupo ricevis specialan honoran flageton.

Dimitro DENČEV

A taŭ la monumento en Oborište — malgraŭ la pluvo...



D-RO DETLEV BLANKE DENOVE EN PLOVDIV

La sperto, kiun donis al ni la ege bonsukcesa pasintjara prelegvojaĝo de d-ro D. Blanke en Plovdiv, la neceso daŭrigi la starigitajn pere de li kontaktojn kun ekstermovadaj medioj en la Plovdiva Universitato kaj en la Junulara Domo, kuragigis la DE de BEA inviti lin ankaŭ ĉi-jare. Li estis tre afabla kaj akceptis la inviton. Ni kun ĝojo gastigis lin inter la 24a kaj 28a de aprilo.

La programo de nia kara berlina gastoj nun estis pli streĉa, sed, ni esperas, bone organizita. Ni povas nur bedaŭri, ke li ne havis eblecon resti pli longe por viziti muzeojn, kontakti geamikojn, viziti interesajn turismajn objektojn en la urbo mem kaj en ĝia ĉirkaŭaĵo. Sed ni esperas, ke li denove venos en Plovdiv kaj tiam ni ne tiom multe laborigos lin.

En nia urbo d-ro Blanke jam havas geamikojn ne nur inter la e-istoj, sed ankaŭ inter la membroj de klubo „Sciencfikcio kaj Prognozo“ ĉe la Junulara Domo, kie li antaŭ unu jaro partoprenis interesan diskuton pri „La lingvo de la estonto — la estonto de la lingvo“. Nun la klubanoj estis iniciatintoj kaj organizantoj de la I Nacia Festivalo de Sciencfikcio, kies oficiala gastoj estis d-ro Blanke. En la kadroj de la festivalo estis diskuto pri „La homo de la estonteco“, kiun partoprenis nia gastoj. Li tuŝis la demandojn pri la lingvo de la estonto kaj havis eblecon paroli kun alia gastoj el GDR, la verkisto de sciencfikcia literaturo, V. Tim, pri la loko, kiun okupas la problemoj de la lingva komunikado en tiu ĉi literatura ĝeno.

Pli ol 120 studentoj de filologio en la Universitato de Plovdiv havis eblecon aŭskulti en E-o (kun traduko en bulgarian) la prelegon de d-ro Blanke pri „Sciencaj aspektoj de la internacia lingva problemoj“, kiu vekis grandan intereson. Ĉeestis la prelegon la estro de la katedro „Lingvistiko“ docento Boris Simeonov. Kun li d-ro Blanke poste havis eblecon interparoli pri diversaj problemoj de komuna intereso.

Ankaŭ la ĝeinstruistoj de germana lingvo en la plovdivaj mezlernejoj aŭskultis prelegon de d-ro Blanke. En germana lingvo li prezentis antaŭ ili (ĉ. 40 personoj) la temon „Planlingvo — teoriaj kaj praktikaj valoroj“, kiun oni sekvis kun atento kaj poste starigis interesajn demandojn.

Du tagojn d-ro Blanke dediĉis al partopreno en la distrikta seminario por aktivuloj de la junulara E-movado, kiu okazis en Karlovo. Pri tio oni aparte informos, nun menciindas la temoj de liaj prelegoj: „Ideologia strukturo de la E-movado“, „Informado kaj argumentado pri E-o“, „Scienco kaj E-movado“, kiuj estis bonegaj lecionoj por la partoprenantoj kaj valorega kontribuo al la realigo de la celo de tiu seminario — eduki la junajn E-aktivulojn.

La tagoj rapide pasis. Nia gastoj devis preskaŭ senĉese prelegi. Restis tro malmulta tempo por iom promeni tra la urbo, interparoli kun E-gvidantoj, ĉeesti koncerton de la Plovdiva Simfonia Orkestro.

Ni opinias, ke la laboro de d-ro Blanke ĉe ni donos bonajn fruktojn por nia E-movado. Tial pro ĉio farita de li, pro lia valora helpo kaj subteno ni plej kore dankas al la amiko, al la ŝatata preleganto, al la sciencisto d-ro Detlev Blanke.

Fani MIHAJLOVA

**FONDITA JUNULARA
E-SEKCIO EN RUSE**

Je la 13a de februaro en la Distrikta Junulara Domo de urbo Ruse kunvenis 25 entuziasmaj junaj e-istoj por fondi junularan E-sekcion ĉe la junulara domo. En la estraro oni elektis: Binka Šiškova — prezidanto, Lazar Hristov — vicprezidanto, Julija Stojanova — sekretario kaj kasistino, Cvetanka Mateeva — kulturamasa kaj turista agado, Elisaveta Georgieva — internacia agado.

La prezidanto de la DE de BEA Nedko Nedev gratulis la ĉeestantojn kaj bondeziris sukcesplenan agadon al la sekcio serve al la paco kaj internacia amikeco. La E-veterano Boris Kavaliev, E-poeto, recitis siajn versaĵojn dediĉe al la okazaĵo.

La membroj de la novefondita sekcio disvolvas interesan E-agadon. Je la 23a kaj 24a de februaro 16 gejunuloj partoprenis la regionan E-konferencon de Nordorienta Bulgario en u. Kubrat. En marto estis organizita printempa amuzvespero. Komence de aprilo la mezlerneja grupo de la sekcio partoprenis en la Revuo de la E-Parolo kaj Kanto en Loveĉ.

La sekcio partoprenis aktive en la preparo de la ĉi-jara Printempa Amika Renkontigo Esperantista (PARE) en aprilo kaj kontribuis al ĝia kulturprogramo. Je la 2—4a de majo tri membroj partoprenis en ekskurso de BEJ al la Junulara E-Renkontigo en u. Tata, Hungario. Antaŭstaras partopreno en la 40a Jubilea Kongreso de BEA en Plovdiv. En septembro membroj de la sekcio partoprenos en junulara laborbrigado apud la ĝemela urbo Potsdam (GDR).

La membroj de la E-sekcio ĉe la Distrikta Junulara Domo en Ruse dediĉos ĉiujn fortojn por popularigo kaj disvastigo de E-o inter la junularo kaj por starigo de amikaj personaj kontaktoj kun junaj e-istoj el la tuta mondo.

Dobrinka ČERNOGORSKA

**NOVA LITERATURA
KONKURSO**

La rezultojn de la Literatura Konkursko de „BE“ ni donos en la sekva n-ro 7-8. Preparu vin por nova konkursko dediĉe al la 1300-jariĝo de la Bulgara Ŝtato (poezio originala kaj trudukita, belarta prozo). En la sekva n-ro ni donos la regularon de la konkursko.

La prezidanto de la DE de BEA en urbo Pazargik, k-do Stojan Tanev, jam atingis 70-jaran aĝon. Tio estas bona motivo por folumi kelkajn pagojn el lia vivo.

Tre juna li eniris la vicojn de la laborista klaso kaj en la periodo 1929—1936 kiel preslaboristo



en Sofio aktive partoprenis la batalojn de la ĉefurbaj laboristoj kontraŭ la kapitalista ekspluatado. Pro tiu aktiveco oni elektis lin sekretario de la profesia societo de preslaboristoj ĉe la Sendependaj Laboristaj Sindikatoj, kiuj tiutempe pro la faŝista teroro agis preskaŭ nelegale.

Estante en la medio de la progresemaj sofiuj e-istoj Nikola Sopov, Dimitro Dojčev, Georgi Lozanov k. a., k-do Tanev iĝis arda amiko de la internacia lingvo E-o. Ofte maldungata pro siaj progresemaj ideoj, en 1936 li venis labori en Pazargik, kie jam estis liaj gepatroj. Ĉi tie li komencis lerni la Internacian Lingvon en kurso, gvidata de la e-isto-veterano Ivan Vasilev, kaj iĝis aktiva ankaŭ kiel e-isto.

Post la faŝista puĉo en 1934 j. en nia lando la burĝa aŭtoritato faris provojn krei dekretitajn laboristajn sindikatojn, celante disvastigi la faŝisman ideologion inter la laboristaro. Pro tio la DK de Bulgara Komunista Partio komisiis al la ĵus reveninta Tanev aktivi en la laboristaj sindikatoj. Li kaj aliaj progresemaj laboristoj baldaŭ okupis la gvidajn postenojn en ĉiuj profesiaj societoj de la urbo inkluzive en la estraro de la regiona sindikata konsilantaro. La presistoj elektis k-don Tanev prezidanto de sia sindikato. Li estis elektita ankaŭ

kiel membro de la urba konsilantaro de sindikatoj. Dum kvar jaroj la laboristaj sindikatoj defendis la interesojn de la pazargika laboristaro, direktante ĝin laŭ la gusta vojo de la klasbatalo.

Dum la antifaŝista batalo en la periodo 1941—44 k-do Tanev estis organizita sekretario de la Pazargika DK de BKP. Kiam en la komenco de 1944 j. la polico, informita pri lia agado, provis lin aresti, li iĝis partizano kaj estrano de la 3a operacia ribela zono kun centro urbo Pazargik.

Post la venko de la popola revolucio je la 9a de septembro 1944 k-do Tanev laboris sinsekve kiel: sekretario de la Urba Komitato de BKP, prezidanto de la Distrikta Konsilantaro de Laboristaj Sindikatoj, urbestro de Pazargik, sekretario de la Pazargika Distrikta Komitato de BKP, unua sekretario de la Regiona Komitato de BKP en Karlovo, unua sekretario de la Urba Komitato de BKP en Pazargik.

Pro sia antifaŝista kaj socia agado k-do Tanev estas dekorita per diversaj ŝtataj ordenoj. Nun, okaze de lia 70-jariĝo la Stata Soveto distingis lin per la alta ordeno Popola Respubliko Bulgario la grado.

Ekde 1963 j. k-do Tanev aparte aktive partoprenas la vivon de E-Societo „Radio“ en Pazargik kaj ekde 1970 estas vicprezidanto de la Distrikta E-Estraro en Pazargik. Kiam laŭ lia iniciato la DE ekagis por konstrui propran E-domon, k-do Tanev estris ĝian mastruman agadon. Li manifestis rimarkindan iniciatemon kaj organizan talenton. Dank'al li la DE sukcesis kolekti la sumon necesan por konstruo de la domo. Vere ĝi estis konstruita en la centra parto de la urbo. Do, en 1974 j. en Pazargik estis solene inaŭgurita la unua en nia lando propra E-domo (propra, apartenanta al E-organizajo). Ĝi fariĝis centro de la E-agado en la urbo kaj la distrikto. Okaze de la 63a UEA kongreso en Varno k-do Tanev, jam prezidanto de la DE de BEA, decide kontribuis por la eldono de la libreto „Pazargik invitas vin“. Granda estas ankaŭ lia kontribuo por la preparo de E-instruistoj en nia distrikto.

Ankaŭ nun k-do Tanev aktive laboras por la sukceso de E-o en la urbo kaj la distrikto, ne ĉesigante ankaŭ aliajn sociajn aktivecojn. Pro sia sindona sociagado kaj pro sia fida batalo por la libero kaj feliĉo de nia popolo li estas ekzemplo sekvinda.

Petko ARNAUDOV

NEFORGESEBLAJ REMEMOROJ

En la plano de la Komisiono pri Internacia Agado ĉe la Distrikta Estraro de BEA en Ruse estis antaŭvidita ekskurso al USSR lige kun la 110a datreveno de la naskiĝo de la granda Lenin. Aligis al la ekskurso 18 e-istoj el Ruse kaj 4 el Sumen. La itinero estis fiksita: Kiev—Riga—Leningrado—Moskvo—Kiŝinev.

La senpacience atendita tago de forveturo fine venis. Ĉe la stacidomo en Ruse granda grupo da e-istoj akompanis la forveturontojn.

La unua renkonto okazis en Bukureŝto. Tie atendis nin grupo da rumanoj-e-istoj. Inter la renkontantoj estis prof. Aurel Boia, Eugenia Markoski, la 80-jara E-veterano Osiŝa, Olga Nika k. a. Floroj, varmaj manpremoj, brakumoj inter delongaj geamikoj, viglaj interparoloj.

La sekvan tagon la vagonaro alveturigis nin en Kiev. Grupo da junaj gee-istoj frunte kun Vladimir Carin atendis kaj kondukis nin tra la urbo. Okazis renkontiĝo de nia grupo kun la e-istoj de Kiev. Dank' al ilia helpo ni transiris la dumilionan urbon dum la nelonga tempo, pri kiu ni disponis. Ĉe la adiaŭo oni faris multajn fotojn, interŝanĝis memordonacojn.

Aviadilo tre rapide alportis nin en la antikvan urbon Rigo, ĝemela al Ruse. Ankaŭ ĉi tie la e-istoj frunte kun M. Burgmajster ĝoje renkontis nin. Nia grupo ĉeestis celebron de Lenin. En la muzeo de ruĝaj palistoj ni ĉeestis solenajn lige kun akcepto de infanoj en la junpioniran kaj komsovolan (junkomunistan) organizaĵojn. Vespere en la junulara E-klubo „Fenikso“ okazis renkontiĝo. Salutojn al la gastoj direktis Semjon Danovskij, veterano de la sovetaj E-movado, kiu rakontis pri la agado de la lokaj e-istoj kaj ties planoj. Respondis Stojĉo Cankov, gvidanto de la bulgara grupo. Sekvis programo el kantoj, recitaĵoj, humuraĵoj, kiun patroprenis Talis Bercis, prezidanto de „Fenikso“, Nataŝa Bercis, S. Danovskij, Stojan Vojevĉ, Jordan Kalinov k. a. La sekvan tagon — renkontiĝo de oficialaj E-reprezentantoj de Ruse kaj Riga. Oni akceptis la ĉefajn punktojn de kontrakto pri amikeco kaj kunlaboro inter la e-istoj de ambaŭ urboj.

Ankaŭ en Leningrado e-istoj atendis nin ĉe la stacidomo. En la Domo de Paco kaj Amikeco okazis kunveno, en kiu reciprokajn salutojn kaj informojn

pri E-vivo kaj agado faris Neli Kubanova kaj St. Cankov. La renkontiĝo estis fakte internacia, ĉar en ĝi partoprenis per salutparoloj ankaŭ la hungara studento Laslo kaj la finna e-istino Mervi Stenberg. Rememorojn pri diversaj E-renkontiĝoj kaj eventoj rakontis Valeria Cvetkova, J. Kalinov, St. Ruseva. K-do St. Vojevĉ instruis al la ĉeestantoj E-kanton. Oni kondukis nin al vidindaĵoj de la urbo: la Palaco de Ekaterina en Puŝkino, Ermitaĝo, muzeoj k. a. Vespere la kajo de la fervojstacio al Moskvo bolis de e-istoj. Sonis E-kantoj, kolektivaj sloganoj „Leningrad—Ruse—Esperanto!“, „Esperanto—Paco—Amikeco!“.

En Moskvo ĉe stacidomo atendis nin E-grupo frunte kun E-veterano Sergej Krajinov. Ankaŭ ĉi tie ĝojaj emocioj, frataj manpremoj kaj brakumoj, novaj konatiĝoj. Oni montris al ni Kremlo, la Muzeon de Lenin, la panoramon „Batalo apud Borodino“, la faman artgalerion „Tretjakovskaja“ k. a. En renkontiĝo en la Domo de Amikeco pri la vivo kaj agado de la Moskva E-Klubo rakontis ĝia vicprezidanto S. Krajinov.

Ĉi en Sovetunio forte impresis nin la fakto, ke en la vivo de la E-klubo tre aktive partoprenas junaj homoj. Tio estas aparte ĝojaĝa.

Al Kiŝinev la vagonaro malfruis, kaj niaj E-amikoj devis longe atendi nin, malgraŭ ke ĉi tie ni devis resti mallonge — nur dum la fervoja paŭzo. La entuziasmaj moldavaj e-istoj renkontis nin kun kantoj, sloganoj, E-flagetoj kaj floroj. Okazis malgranda, sed impona mitingo. La publiko tamen estis multnombra: pasaĝeroj, renkontantoj, akompanantoj, fervojistoj...

En Bukureŝto niaj rumanoj samideanoj denove renkontis nin ĝoje.

Ni alvenis en Ruse feliĉaj kaj kontentaj, plenplenaj je riĉaj impresoj, sentoj kaj travivaĵoj, kun rememoroj por tuta vivo neforgeseblaj kaj kun forta volo labori ankoraŭ pli vigle por ampleksigo de nia kunlaboro kun la frataj sovetaj e-istoj, por novaj venkoj de la sankta kaj vivokrea bulgara-soveta amikeco, por paco kaj amikeco inter la popoloj en la tuta mondo.

Stojĉo CANKOV,
Jordan KALINOV

LA ESPERANTO-MOVADO EN PLOVDIV

DOMMASTROJ DE LA JUBILEA KONGRESO

La e-istoj de urbo Plovdiv estas dommastroj de la 40a Jubilea Kongreso de BEA. Ĉu tio estas hazardo por la e-istoj de la dua urbo en nia lando? Kompreneble ne. Ni iomete foliumu la paĝojn de la E-historio.

GRAVA CENTRO

Post la liberigo de Bulgario el sub la kvinjarcenta otomana jugo, Plovdiv fariĝis grava centro en la kultura vivo de la nova ŝtato. En ĝi koncentriĝis la plej progresemaj ideoj el la fina jardeko de la pasinta jarcento. Venis ankaŭ la ideo pri E-o. Ĝin alportis la rusa gazeto „Niva“ (Agrokampo), kiun plovdivanoj regule legis.

La unua elstara organizanto de la E-movado en Plovdiv estis la poŝtoficisto Georgi Oreŝkov, veninta el Koprivŝtica. En la jaro 1899 li eldonis la libron „Koncizaj informoj pri la internacia lingvo E-o“. Entuziasmigita pro la sukceso de sia libro, Oreŝkov en 1900 j. kune kun alia sindona e-isto kaj pioniro de nialanda E-movado, Aristo Popov, instruisto en vilaĝo

Dolna Orjahovica, distrikto de Veliko Tŝrnovo, eldonis lernolibron: „Plena gvidlibro por lernado de internacia lingvo Esperanto“. La saman jaron la intereso al E-o plifortigis kaj estis kreita organiza centro, kiu ekdirektis la propagandon kaj lernadon de E-o. La 15-an de februaro 1901 estis fondita la unua E-klubo en Plovdiv — „Stelo“. Lia prezidanto fariĝis Ilija Bobĉev kaj sekretario Georgi Oreŝkov. Grandega estis la entuziasmo de la fondintoj. La membroj de la klubo en la fino de 1901 estis pli ol 200. Al ĝi aliĝis multaj e-istoj el la tuta lando, kaj ankaŭ eksterlandaj: francoj, belgoj, germanoj, svedoj, norvegoj, turkoj k. a.

La klubanoj venkis grandajn malfacilaĵojn — materialajn kaj teknikajn. En februaro 1902 ape-

ris la unua ilustrita revuo de la bulgaraj e-istoj — „Rondiranto“. Redaktis ĝin Oreŝkov kaj Georgi Atanasov. „Rondiranto“ ne nur estis propaganda E-revuo, ĝi ankaŭ priskribis la bulgaran vivon kaj la politikan situacion en Bulgario. La reĝo pri la nova revuo estis granda kaj kuraĝiga. Jen kion skribas la sekretario de la sveda E-klubo en Stokholmo: „Per „Rondiranto“ mi ekkonis tute novan por mi mondon, mi konatigis kun... la bulgaroj.“

Post 1904 la E-movado en Plovdiv ekiris malsupren. Forlasis la urbon Georgi Oreŝkov, kiu tamen, en alia logloko, ne forlasis la Movadon ĝis la fino de sia vivo.

En daŭro de multaj jaroj „Stelo“ vegetis. Pri tio kulpis ankaŭ la periodoj de tri militoj. Nur post la Unua Mondmilito en Plov-

div reale kreigis kondiĉoj por renovigo de la E-movado. 1919 estis jaro de plivigliĝo. En oktobro estis fondita junulara E-Societo „Fervoro“, kiu daŭrigis la agadon de „Stelo“.

SENĈESA KRESKO

En oktobro 1921 la juna ka entuziasma inĝeniero Dimitro Malĉev kontaktigis kun la komunista junularo kaj organizis multnombrajn E-kursojn. Samtempe en Plovdiv ekagis alia arda e-isto — Penko Stoev. En la jaroj 1921—1922 E-o estis enkondukita en iujn gimnaziojn. D. Malĉev kaj P. Stoev estis la unuaj oficialaj E-lektoroj en Plovdiv.

La nombro de la e-istoj en Plovdiv dum tiu periodo kreskis senĉese. Tamen ili agis sufiĉe izolate. Laŭ iniciato de D. Malĉev la 14an de julio 1922 en salono de popola legejo „Ivan Vazov“ la plovdivaj e-istoj kolektigis kaj fondis novan klubon — „Kulturo“. Ĝia prezidanto fariĝis Malĉev, sekretario — Panĉo Nikolov kaj bibliotekisto Kostadin Mateev, kiu en 1923 j. pro la furiozanta faŝisma reĝimo de Aleksandro Cankov devis elmigri.

En majo 1926 en la urbo okazis subbulgara E-konferenco kaj en 1927 — la XIV kongreso de BEA.

Iom post iom en la E-vicojn eniris pli da laboristoj kaj antifaŝistoj. En la komenco de 1930 estis fondita laborista E-societo, kiu ekbatalis por la celoj de la laborista movado kaj propagandis la socialisman konstruadon en Sovetunio.

DUM LA TERURA TEMPO

Honoro estas por la plovdivaj e-istoj, ke en tiuj tagoj de terura politika teroro ili ne klinis la kapojn, sed per laŭta voĉo protestis kontraŭ la reaktia politiko de la regantaj burĝaj partioj, kiuj kredis regi la landon per policaj persekutoj, malliberejoj kaj mortkondamnoj.

Fine de 1932 ĉe la laborista E-societo fondiĝis grupo PEK (Proleta E-Korespondanto), kies tasko estis elektadi interesajn korespondadojn el la landa laborista gazeto kaj sendi ilin al la eksterlanda progresema gazeto kaj inverse. Membroj de tiu grupo estis Kalina Nikolova, Kostadin Ĉicanov, Hristo Marinov Gorov (Hrima) k. a., kiuj elkreskis kiel talentaj ĵurnalistoj, tradukistoj kaj verkistoj.

La 19an de majo 1934 en la lando okazis nova faŝisma puĉo. La laborista E-movado estis devigita eklabori nelegale. Dum tiu periodo en Plovdiv komencis aperadi la gazeto „Sturmulo“ sub

la redakto de Hristo Gorov (Hrima). Jam de la unuaj paĝoj oni vidis, ke la gazeto estas vera laborista tribuno. Multaj ekzempleroj de la gazeto estis ekspeditaj al Sovetunio, Anglio, Nederlando, Germanio, Belgio k. a. Tiel la monda progresema esperantistaro ricevis informojn pri la politika situacio en nia lando. Sur la paĝoj de „Sturmulo“ aperis multaj materialoj defende al Georgi Dimitrov, Vasil Tanev kaj Blagoj Popov, kiujn la faŝista tribunalo en Lajpco registaro kaj polico tiu agado ne plaĉis kaj ili faris ĉion eblan por ĝin ĉesigi. Fine ili eltrovis kaj arestis la redaktorojn kaj kelkajn kunlaborantojn de „Sturmulo“. Ili estis jetitaj en malliberejojn.

DENOVE AKTIVA AGADO

Paralele kun la aktiva agado de la laborista E-societo, en klubo „Kulturo“ la E-vivo vegetis. Dank' al la apostola laboro de D. Malĉev, Iv. Sivarov k. a. la E-societo tamen sukcese travivis tiujn jarojn. Malĉev komencis eldoni monatan bulgarlingvan gazeton „Kulturo“ por propagandis E-on. Dum 1931—32 jaroj li eldonadis ankaŭ la ĉiutagan ĵurnalon „Telegramo“ — unika provo en la historio de la tutmonda E-movado.

Laŭ iniciato de la Centra Komitato de BEA la 5an de majo 1935 E-Societo „Kulturo“ organizis landan konferencon, kiu havis la celon plivigli la Movadon. Multaj el la laboristoj kaj antifaŝistoj, kiuj membris en la nelegala laborista E-societo, eniris la vicojn de „Kulturo“ kaj komencis aktive agadi en ĝi. Tiaj estis Slavĉo Georgiev, Ivan Bataklijev, Angel Siŝkov k. a. Ili komencis informi vaste la bulgaran publikon pri la politika internacia situacio, tradukante artikolojn el „Oriento Kuriero“, „Ĉinio Hurlas“, „Voĉoj el Oriento“ k. a. Regule estis ricevata la hispana esperantlingva eldonaĵo „Popola fronto“. El ĝi oni tradukis kaj publikigis materialojn pri la justa batalo de la hispanaj patriotoj kontraŭ la faŝismo dum la civila milito en Hispanio.

La lasta granda E-evento en Plovdiv antaŭ la 9. IX. 1944 estis la tutlanda konferenco en majo 1940. Tiu konferenco partoprenis pli ol 200 e-istoj. Ili vizitis la foiran ekspozicion kaj kun aparta intereso trarigardis la sovetan pavilionon.

Venis malfacilaj militaj jaroj. Komence la membroj de „Kulturo“ aranĝis vesperojn de „Parolanta gazeto“ en legejo „Antim I“, sed post la invado de la germanaj hitleranoj en Sovetunion ili estis devigitaj ankaŭ tion ĉesigi. Ĉiuj kunvenoj estis oficiale malperme-

sitaj. La plimulto de la e-istoj eniris la vicojn de la kontraŭfaŝisma batalo. En tiu peza batalo kun armilo en mano pereis multaj e-istoj: Dimitro Surlev, Georgi Jeĉev, Rajĉo Kirkov, Kosta Atanasov, David Sasonov, Dimitro Petrov, Vlado kaj Cvjatkio Davidov, Todor Sofroniev, Ivan Filev, Stefan Georgiev, Argir Stoilov, Stojan Mihajlov, Spiro Veselinov, Stojan Siŝkov, Albert Benvenisti, Rajĉo Germanov k. a.

POST LA POPOLA VENKO

La e-istoj de Plovdiv varme salutis la popolan venkon je 9. IX. 1944. Jam la 25an de septembro ili kolektigis kaj renovigis la agadon de „Kulturo“. En la protokolo de tiu kunveno ni legas, ke la E-societo „akceptas kaj apogas la programon de Patrolanda Fronto“ en Bulgario.

En la riĉa biografio de la Plovdivaj e-istoj restos ĉiam rimarkinda la jaro 1947: la 9an de septembro de tiu jaro en Plovdiv okazis la 30a Jubilea Kongreso de BEA, en kiu la bulgaraj e-istoj deklaris sian firman decidon labori por ĉiuj fortoj por la konstruo de nova socialisma Bulgario.

Dum la 80-jara historio de la E-movado en Plovdiv oni povas konstati senĉesan supreniron. Kun ĉiu nova jaro la nombro de la e-istoj pliiĝas kaj ties agado pligrandigas — por la bono de nia socialisma patrujo, por la fortikiĝo de la amikeco kaj paco inter la popoloj. Nun en la urbo paralele kun la E-societo veterano „Kulturo“ funkcias ankaŭ E-societoj de fervojistoj, studentoj, poŝtofciistoj, lernantoj kaj blinduloj.

La e-istoj de Plovdiv rigardas la 40an jubilean kongreson de BEA kiel honorigon pro la sindona agado de pluraj E-generacioj, kiuj laboris por krei la grundon, sur kiu vigne kreskas la nunaj sukcesoj de la Bulgara E-movado kaj la ĉiuflanka prospero de socialisma Bulgario.

Jordan ANGELOV

ATENTIGO!

En la versaĵo de k-do P. Poliščuk paĝo 12 de n-ro 4, en la unua linio de strofo 4 estas allasita grava eraro: anstataŭ „akuzo“ devas esti amuzo.

Ni petas pardonon de la aŭtoro kaj de la legantoj!

LI NE MORTAS

ĈIAM KUN NI

La membroj de la Bukureŝta Sekreta Revolucia Komitato jam delonge estis kolektigintaj kaj ankoraŭ atendis. La nigraokula kaj abundhara Hristo, la filo de la instruisto en Kalofer Botjo Petkov, senpacience de tempo al tempo jetis rigardon al la pordo. Devis veni Efrem, la homo, kiu povus malkaŝi la misteron. Li estis anoncinta, ke tiun ĉi vesperon li estos inter ili. Sed kial do li ankoraŭ ne venas?

Botev apogis la kapon sur siaj manoj kaj fiksis absorbitan rigardon al la flagretanta flamo de la sebkandelo. Tri jaroj pasis de post la morto de Haĝi Dimitro, sed en Bulgario obstine disvasligas onidiro, ke li estas viva. La popolo rakontas: „Haĝi Dimitro, grave vundita, estas kaŝinta sin en la plej profunda kaverno de Stara Planina... Aglo, reĝo de la birda regno kaj frato de la bravuloj, zorgas pri li... Per sia beko ĝi portas al li akvon...”

Botev ellasis sopirĝemon. Lia mieno reakiris sian serenecan. Ho, tiu kara bulgara popolo! Ĝi ne enterigas tiel facile siajn heroojn... La rikoltistinoj kantas. Cargena estas ilia kantado, ili lamentas pri la tragika sorto de la popolo, ĝemanta sub la otomana jugo. Inĝe Vojevodo, surrajdinte blankan ĉevalon kaj kolektinte kvincent bravulojn, gardostaras protekte, por ke turkoj ne senhonorigu la belecon de la bulgaraj junulinoj, por ke la ĉorbagoj ne turmentu la laborkonsumitajn plugistojn kaj fosistojn.

— Mi ja diris al vi, Ilarion, — ekaŭdis Botev ies voĉon, — Haĝi Dimitro estas viva. Li kaŝis sin ie kaj atendas nin...

— Dio volu, ke tiel estu! Ni ja pro tio sendis Efrem'on al Bulgario, ke li komprenu kaj raportu! Plue estos facile — helpoj ni tuj sendos al li.

La pordeto malrapide duonmalfermiĝis kaj en la ĉambron eniris Efrem. Vidinte lin, la kunvenintoj tuj ekstaris kaj ĉirkaŭis lin.

— Nu, diru, jam tre longe ni atendis vin!

— Kio okazis, ĉu vi ekscitis ĉion?

Efrem levis rigardon. En liaj nigraj okuloj ekbrilis larmoj. La vortoj estis superfluaĵ. Cies manoj aŭtomate demetis la peltĉapojn kaj premis ilin tien, kie batadis iliaj emociitaj koroj...

— Fratoj, — mallaŭte ekparolis Efrem en la ekstinta silento, — nia kara Haĝi Dimitro estas mortigita kaj estos ne plu inter ni. Tre dolore estas, mi scias, sed mi eksciis el aŭtentika fonto, ke la glora vojevodo putras en la tero...

— Kaj la onidiroj? Ĉu la onidiroj ne konfirmiĝis, ĉu ne estis vere, ke Haĝi Dimitro sin kaŝis en kaverno, atendente helpoj?

— Ne, Ilarion, la popolo ankoraŭ kredas, ke li estas viva. Se vi scius, kian konversacion mi havis... En iu vilaĝo proksima al la montosupro Buzluga, la loko, kie estis la lasta batalo, loĝas maljunulo Velislav. Iun tagon li renkontis min kaj komencis admoni min: „Aŭskultu bone, junulo, vi ne kredu al tiuj homoj, kiuj diras, ke la vojevodo estas morta. Vivas li, vivas, tion vi memoru de via avo Velislav! Mi ripetas al vi, ne kredu al la malamikaj onidiroj, vivas li, vivas! Heroo, kiu oferas sian vivon por Bulgario, ne mortas!...”

Botev ektemis. Flustre li ripetis la lastajn vortojn de la maljunulo. Liaj okuloj ekbrilis. Tiu ĉi flamo estis tiel konata al liaj kamaradoj. Tio signifis, ke naskiĝas nova poemo. La vento, penetranta tra la duonmalfermita pordo, distaŭzis la barbon de la juna viro, kaprice kaj ludeme flir-

(Sekvas sur p. 13)

Konata vero estas, ke al la literatura kampo poetoj kaj verkistoj iras are, sed daŭre restas kaj famigas nur unuopuloj. Restas tiuj, kiuj posedas vere kreivan talenton, tiuj, por kiuj la literaturo ne estas profesio, kariero, nur



Pentraĵo: D. Haĝiev

rimedo gajni la panon, sed vivsorto. Tia poeto estis Penjo Penev. Li aktiviĝis nur dek jarojn sur la kampo de la bulgara poezio (1949—1959) kaj pereis juna, apenaŭ 29-jara, sed por ĉiam okupis lokon en nia literaturo.

Tiu eterna junulo estas naskita en 1930 j. en la vilaĝo kun sonora nomo Dobromirka, kaŝita inter la antaŭmontoj de Balkano, nun en la distrikto de Gabrovo. La aktiva politika kaj kultura vivo en tiu vilaĝo antaŭ la 9 de septembro 1944, la vigla popululita agado de tiaj amasorganizaĵoj kiel la popola legejo „Probuda“ (Vekiĝo), la abstinula societo „Zornica“ (Matenstelo), la laboro de la organizaĵo de Bulgara Komunista Partio, fondita en 1920 j. kaj de ĝia junulara organizaĵo Rems (RMS) donis sian stampon al la tuta vivo de la vilaĝo. Forte ĝi efikis ankaŭ la spirital kaj idean formigon de la sentema infano kaj adoleskanto. Sed aldonigas ankoraŭ io, tre specifa: pelate de la malriĉeco la vira loĝantaro de Dobromirka ĉiujare — de frua printempo ĝis malfrua aŭtuno forlasadis la vilaĝon kaj iris aliloken por gajni la panon de siaj familioj per konstruado. Jam en malnova tempo dobromirkaĵoj estis konataj domkonstruistoj, kaj ilin oni povis trovi ĉiutage en la lando. Tio aparte efikis la animon de Penjo.

La infano kreskis en meze riĉa labora familio. Tre frue li persone konatiĝis kun la fizika laboro kaj ekŝatis ĝin. Samtempe li multe kaj aŭde legis. Kaj jen mirindaĵo: post la fino de la gimnazio en Seŭlievo li ne iris studi en supera lernejo, sed kune kun la majstroj-konstruistoj de Dobromirka iris al Suda Bulgario por konstrui la urbon de Dimitrov (Dimitrovgrad*) apud rivero Marica. Kia nobla idealismo! Tie nur dum kelkaj jaroj la junulo fariĝis amata poeto de la konstrulaboristoj. Kaj de priskribo de ilia peza kaj streĉa laboro, ege necesa kaj grava, li iris al vastaj belartaj ĝeneraliĝoj kaj fariĝis la plej inspirita poeto de la konstruado de nova, socialisma vivo en nia patrolando. La patoso de la socialisma konstruado estas la ĉefa motivo kaj spirito de lia arda poezio. Vidu la titolojn de liaj poemoj: „Konstrua printempo“, „Korpo 206“, „Pluvo super la konstruaĵoj“, „Muzeo de la konstruado“, „Dimitrovgrad“, „Kiam konstruiĝis la fundamentoj“ k. a. Preskaŭ en ĉiu lia verko la konstruado estas ĉefa motivo aŭ fono, sur kiu realiĝas la nova sorto de la nova homo — jam mastro kaj de sia sorto, kaj de sia patrolando.

Nenie la poeto estas observanto el kabineto, sed aktive partoprenas la pezan laboron, ŝvitante kune kun la laboristoj, vivas kun iliaj maltrankviloj kaj esperoj, kun iliaj ĝojoj kaj malĝojoj, kun ilia fiero pri ĉio de ili konstruita. Kaj li plene rajtas adresi sin al la posteuloj:

**Idaro nia, vane vi klopodos —
neniam eble finkomprenos vi,
kiam la fundamentoj konstruiĝis,
ho, kiam vivon vivis ni!**

Kaj ankoraŭ:

**Malfacilaĵoj milaj nin sufokis,
sed enilinda estis nia sort!
Ne tagojn vivis ni, epokon —
batalon spertis ni je vivo kaj mort!**

Aparte fieras la poeto, ke en la febro de la konstrulaboro formiĝas la trajtoj de novtempa homo — la homo de la socialismo: kun alta moralo, sen la rusio de la malnova antagonisma socio. Kaj li plenvoĉe adresas sin al la mastroj de la kapitalisma socio:

**Teknikon vi havas —
grandegan, modernan!
Pri kio ne famas
la mondo de l'or!
Ne havas vi tamen,
vi tute ne havas
la homon liberan
de l'libera labor!**

Hodiaŭ, kiam nia planedo bolas pro politikaj krizoj, militminacoj kaj ĉantaĵoj far la usonaj imperiistoj-ĝendarmoj kaj la ĉinaj hegemoniistoj, ni vere volas pli ofte legi versojn, kiajn Penjo Penev skribis ĉe iu kriza momento en la historio de la homaro dum la 50aj jaroj:

* Urbo portanta la nomon de la fama Georgi Dimitrov.

**Antaŭ la hienoj
neniam ni genufleksos!
Estu trankvila, patrujo!
Vin kalumniu!
Kriegu kontraŭ vi la malamiko!
Vi sciu:
ŝtormoj kaj fulmotondroj
rondflugas nur super suproj!**

Nebridita, printempa forto bolas en ĉiu verso de la poeto, kvazaŭ tra ĉiu vorto trapasas uragano, kiu detruas la malnovon kaj forpelas la nebulojn de la pasinteco por purigi la ĉielon super la kara patrolando. Penjo Penev skribis per plumo, trempita en la sangon mem de la nova, impela vivo de juna socialisma Bulgario. Tial lia verkaro estas kaj estos ĉiam aktuala kaj mobilizanta.

Honesta, fajrodinamika, ne toleranta maljuston kaj tiranecon — tia marŝas la poeto en niaj vicoj ankaŭ nun. Dumvive li fariĝis amato de nia popola junularo, antaŭ kiu li ofte recitis (neniam legis!) siajn fajrospirajn poemojn. Amato de nia laborpopolo kaj inspiranto survoje al la komunismo li restos ĉiam.

Kunĉo KARAVELOV

(el paĝo 12)

ligante la hartufon, pendantan super la frunto de lia nesubigema kapo. Kaptis lin stranga inspiro.

— Fratoj karaj, aŭskultu!

Eksaltinte, li ekstaris sur la seĝo kaj komencis:

— Vivas li, vivas... Sur ĝia Balkano *

Ĉiuj retenis sian spiron. La vortoj fluadis pompe el lia buŝo, jen teneraj kaj kortuŝaj, similaj al ĝemo, jen per sia efiko igis bati ankoraŭ pli forte la bravulajn korojn.

Li ĉirkaŭrigardis siajn kamaradojn, vidis iliajn flamantajn pupilojn, komprenis, kio okazas en iliaj animoj. Levinte alten la kapon li inspirite daŭrigis:

— Hero' falinta por la libero
mortas neniam!...

* La unuaj vortoj de la balado de Ĥr. Botev pr a fama popola vojevodo Haĝi Dimitro.

Stefka BOGDANOVA,
Anna MINDOVA

NIAJ FUNEBROJ

Forlasis niajn vicojn kelkaj aktivaj kaj sindonaj samideanoj:

STOJKO KOLEV FORTUNOV — E-veterano, membro de la DE de BEA en Loveĉ. Eksa popola instruisto, direktoro de lernejo, estro de fako „Popola klerigo“, aktiva batalanto kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo, ĉiam aktiva sociaganto kaj arda e-isto.

KIRIL BOGUTINSKI — E-veterano. E-on lernis post la Unua Mondmilito. Kurgsvidanto, de 1925—1958 kasisto de E-societo „Vekigo“ en Ŝumen; verkis historion de la societo.

JORDAN GRUEV JAKIMOV el v. Rebrovo, Vraca-distrikto, fondinto de E-societo „Nikola Vapcarov“ en u. Mezdra kaj ĝia multjara prezidanto, aktiva batalanto kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo.

GEORGI SOTIROV JANKOV — E-veterano, membro de E-societo „Stoju Kalpazanov“ en Velingrad. E-ton lernis en Batak kiel lernanto en mebla lernejo, kursano de la konata Petro Toŝkov. Ellerninte aŭtodidakte germanan, rusan, turkan kaj ciganan lingvojn. Li tamen plej multe ŝatis kaj propagandis E-on en sia loĝloko v. Rakitovo apud Velingrad.

Niajn kondolencojn!

LIA PLEJMOŝTO LA HOMO

Nu, kiu asertas,
ke mia hejmlando
ne havas
palacojn el blanka marmor',
ke estas lastloke,
sen granda reganto,
sen grandaj kreintoj,
kovritaj de glor'?

Nu, kiu?
Ĉu vi, aferist' monprofito,
avida rabisto
de l'homa labor'?

Vi venu
al lando ĉi renovigita,
nun venu kaj vidu
bonege,
sinjor'!

Vi havas teknikon —
modernan, superan!
Per kio ne famas
la mondo de l'or'?

Vi tamen ne havas
la homon libran
de nia patruj
de l'libera labor'!

Nu, venu kaj vidu! —
Jen nia reganto
sur trono el revoj,
obstin'
kaj beton',

potence staranta,
tenanta sen vanto
ne sceptron en man',
sed ĉizilon por ŝton'!

Li havas
fabrikojn,
halegojn,
grensilojn
kun sklavoj servemaj —
la temp' kaj teknik'.

Ĉi tie li tenas
la malfacilojn
prizone
malantaŭ muregoj el brikoj.
Sub sia regad'
laŭ la leĝ' de l' labor',

de l' viv'
kolektinta la tutan aromon,
postenas,
laboras
kun krea fervor',

senmorta,
li —
Lia Plejmoŝto
la Homo!

El la bulgara: Dimitro ĤAĜIEV — TEMPESTO

REEŬO: „DEMANDU EN ESPERANTO!“

Tre trafa estas la alvoko de Monda Turismo, publikita en „BE“ n-ro 4, ke e-istoj, vojaĝantaj en eksterlando turnu sin en E-o al diversaj oficistoj kaj civitanoj. Tiu rimedo estas nulkosta, sed efikas eble pli ol propagandaj gazetartikoloj.

Antaŭ nelonge mi parolis kun eminenta profesoro el Moskvo, kiu partoprenis multajn internaciajn kongresojn de naŝtistoj kaj geologoj en diversaj landoj. Foje en Hungario oni demandis lin, ĉu li scias E-on. Tiel li konvinkigis, ke e-istoj ekzistas, kaj kun danko akceptis de mi lernolibron de E-o. Alia sovaĝa fakulo, oficvojaĝanta en Hungario (denove Hungario!), estis eĉ dufoje tie demandita, ĉu li parolas E-on.

Tia amasa provado intermalkovri per E-o kun eksterlandanoj devas fariĝi nia kutimo.

Boris KOLKER

Delando
al lando..RENKONTIĜO KUN LA LENINGRADAJ
ESPERANTISTOJ

En marto ĉi-jare pro mia profesio mi havis la ĝojon tutan monaton vivi kaj labori en Leningrado. Mi havis la feliĉon ankaŭ konatiĝi kun la leningradaj e-istoj kaj ilia vivo.

La E-societo en tiu belega urbo estas tre vigla. Troviganta en la kulturpalaco „Kirov“, ĝia klubejo estas ornamita per diversaj konvenaj tabuloj kaj bildoj. Sed plej interese estas, ke dum la vespero de kunvenoj la klubejo estas plenplena de e-istoj.

En marto tie okazis tre interesa vespero, dediĉita al la historio de la E-movado en Sovetunio. En perfekta lingvo prelegis la fama veterano Podkaminer. Ĉiuj aŭskultis lin kun granda intereso kaj starigis demandojn. La prelego estis vigla kaj vere kortuŝa, ĉar k-do Podkaminer persone partoprenis multajn eventojn.

Lastatempe en la leningrada gazetaro pli kaj pli ofte aperas artikoloj, kiuj rakontas pri sindona E-laboro. Ekzemple aperis artikolo pri teatra trupo, konsistanta el artistoj-e-istoj. Ili preparas esperantlingvajn spektaklojn. En sia lasta spektaklo la artistoj prezentis ankaŭ bulgaran humuron el Gabrovo. La klubanoj preparadis afiŝan sportan ekspozicion okaze de la olimpikaj ludoj.

Ege agrablan impreson faras la fakto, ke dum la kunvenoj, dum la oficialaj prelegoj kaj amikaj neoficialaj konversacioj oni povas aŭdi nek vorton nacilingvan.

La leningradaj e-istoj treege estimas kaj amas la bulgarajn e-istojn. Ili konstante ampleksigas kaj profundigas siajn rilatojn kun bulgaraj E-societoj kaj apartaj homoj.

La E-klubo de Leningrado agadas sub protekto de la Asocio de Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksterlando. En tiu Asocio oficas k-do Volkov, kiu respondecas pri la E-sekcio. Li ege aktive kaj entuziasme laboras por disvastigo de E-o. Ĉiuj konas, estimas kaj amas lin, ĉar li vere estas apogilo por la E-movado en Leningrado.

Oni ofte diras, ke se iu vizitus la urbon de Lenin, li ekŝatus ĝin kaj ĉiam sopirus revidi ĝin. Mi kuraĝas aldoni, ke ĉiu homo, havanta kontakton kun la leningradaj e-istoj, ekamas ilin kaj por ĉiam konservas siajn kontaktojn kun ili.

Maria ANGELOVA

GRAVA ALVOKO!

INTERNACIAJ EKSPOZICIOJ
DE LA INFANA ARTO

Samarkanda E-Klubo de Interpopola Amikeco organizos en decembro 1980 migrantan internacian ekspozicion de infandeseĝnaĵoj. Oni bonvenigas kontribuojn el ĉiuj landoj. Dorsilanke bonvolu indiki temon, nomon, aĝon, sekson kaj adreson de la aŭtoro. Ĉion sendu — se eblas baldaŭ — al adreso: Petro Poliŝĉuk, SU — 700 000 Taŝkento, ul. Engelsa 4, kv. 28, Uzbekistano, Sovetunio.

Ni nepre rekompencos ĉion ricevit! Krome interesaj premioj atendas la infanojn, kiuj plej bone prezentos sin.

Karaj samideanoj, por konigi E-on vaste inter la infanojn ni decidis okazigi grandan ekspozicion de infandeseĝnaĵoj. Temo libera. Dorse de la desegnaĵoj skribu nomon, aĝon, sekson, adreson de la aŭtoro.

Ĉion sendu al: Esperanto-grupo, str. Forn, 19, Moya (Barcelona), HISPANIO.

LENIN EN LA KORJOJ DE LA POPOLOJ

Tiel nomiĝis la ekspozicio malfermita la 22an de aprilo 1980 en la Centra Regiona Biblioteko „A. S. Puŝkin“ en u. Samarkando, Uzbekistano. La organizintoj — Samarkanda E-Klubo de Interpopola Amikeco kaj la regiona filio de Uzbeka Amikeca Asocio — dediĉis ĝin al la glora 110a naskiĝdatreveno de V. I. Lenin. Dum la solena malfermo salutparolis la dua sekretario de UK de Komsomolo Zinkeviĉ M. V., la scienca vicedirektoro de la biblioteko Malinina N. F., la prezidanto de Samarkanda E-Klubo Ionesov A. I.

En la ekspozicio estis montritaj materialoj el 11 landoj (Pollando, Hungario, GDR, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio, Kubo, Vjetnamio, Belgio, Venezuelo, USSR) temantaj pri la vivo kaj revolucia agado de V. I. Lenin. Ni nur menciis kelkajn standojn: „Ili vidis Lenin“, „Lenin en Esperanto“, „Ĉi tie estis Lenin“ k.a. La ekspozicio atestas pri tio, ke la nomo de Vladimir Iliĉ estas senfine kara al ĉiuj honestaj homoj de nia planedo. Laŭ liaj senmortaj verkoj lernas vivi, batali kaj venki milionoj da homoj en la tuta mondo.

INTERLINGVISTIKA AGADO

Inter la 9a kaj 21a de aprilo okazis la 39a Studenta Scienca Konferenco de Samarkanda Stata Universitato „ALISER NAVOJ“, dediĉita al la glora 110a naskiĝdatreveno de V. I. Lenin. Same kiel pasintjare en la kadroj de la konferenco funkciis aparta sekcio pri interlingvistiko kaj esperantologio. Ĝin partoprenis studentoj de 6 superaj lernejoj de Samarkando kaj Taŝkento. Estis traktitaj jenaj temoj:

1. JERMANOVA L. E-o kiel lingvo de teatro.
 2. SAKAROV A. La sciencetika revolucio kaj problemoj de la multlingveco.
 3. HAFIZOVA H. L. Zamenhof — lingvisto kaj kuracisto.
 4. TJUTJUNGI JE. La Granda Oktobro kaj E-o.
 5. FAJZIJEV S. E-o kiel propedeŭtika lingvo.
 6. HASANOV R. Sporta terminologio en E-o.
 7. ABBOSOV M. Problemoj de la vortfarado en E-o.
 8. HAMRAKULOV S. Strukturo de E-o kompare al naciaj lingvoj.
 9. IONESOV A. Planlingva projekto Volapük.
 10. BALASJAN J. Lingvistika valoro de E-o.
 11. NURIJEVA S. La brita skolo en la E-poezio.
 12. SERMAN L. Internacia lingvo kaj internacia edukado.
 13. IBRAGIMOVA M. Jura statuto de E-organizoj.
 14. ANPLEJEVA V. M. Gorkij kaj E-o.
 15. KIM S. L. N. Tolstoj kaj la internacia lingvo.
- Ĉiuj supremaciitaj titoloj de la prelegoj troviĝas en la programo de la konferenco eldonita de la Samarkanda Stata Universitato.

EL LA INTIMA VIVO DE LA E-ISTOJ

Fine de marto geedziĝis gee-istoj Saeko Mutoo, floraraĝa instruistino el Tokio, Japanio, kaj elektroteknika Raŝo Dargov el Sofio, Bulgario. La geedigan ceremonion partoprenis ankaŭ e-istoj. Sanon kaj feliĉon, kara juna geedza paro!

En la tagoj de la 63a UK de E-o en Varno (1978) en la solena kongreshalo geedziĝis gesamitcanoj Tomoko el Japanio kaj Momĉilo Krstić el Niŝ (Jugoslavio). La 27-an de januaro la familio grandiĝis: naskiĝis filo Ivo. Laŭ asertoj de la feliĉaj gepatroj li tre bone ploras en E-o. Ili promesas, ke baldaŭ li ankaŭ bone ekparolos en E-o.

Sanon kaj feliĉon al Ivo kaj liaj gepatroj!

Laŭ iniciato de la junulara komisiono de Centra Laborrondo en la Kulturligo de GDR je la 19—24 de majo en Phöben (apud Potsdam) okazis Internacia Junulara E-Seminario. Ĝin partoprenis 15 gejunuloj el Ĉeĥio, Slovakio, Pollando, Bulgario kaj GDR. BEJ estis reprezentita de Verĵinija Dokova (Vidin). Evgeni Georgiev (Sofio), Elisaveta Georgieva kaj Lazar Hristov (Ruse).

La temo de la seminario estis „Esperanto laŭjunulara“. Ĉiu junulara E-organizaĵo en socialisma lando prezentis sian agadon dum 1979—80. Aparte interesan prelegon „Kiel organizi junularan E-aranĝon?“ faris Vazlav Vitek (Ĝeĥio). Sekvis vigla diskutado.

Krom tio la labora programo inkluzivis ankaŭ atentokaptajn prelegojn. La vicprezidanto de CLR Ludwig Schödl detale prezentis per bildoj kaj presmaterialoj la agadon de Germana Laborista E-Asocio. Jürgen Hahmann prelegis pri la libro „Fundamento de Esperanto“ kaj pri la Neŭtrala E-Movado.

Okazis lumbildprelego pri Potsdam kaj tuttaga ekskurso al tiu vidinda urbo. Interesa estis la promenado tra la bela ĉirkaŭaĵo de Phöben.

La seminario kontribuis por la fortikiĝo de la amikaj kontaktoj inter la junaj e-istoj en socialismaj landoj.

E. G.

EN LA AKADEMIO DE ESPERANTO

En la lastaj elektoj por nova estraro de la Akademio de E-to estis elektita kiel prezidanto magistro William Auld (Ujlam Old), Britlando, gvida verkisto en la E-a literaturo kaj vicprezidanto de UEA. La du vicprezidantoj fariĝis prof. d-ro Stojan Ĝuĝev (Bulgario) kaj Paul Neergard (Danlando).

La ĝisnuna vicprezidanto Atanas Danĉev Atanasov (Bulgario) petis sian eksigon pro jam tre granda aĝo (88 jaroj).

*La feliĉaj junaj geedzoj
ing. Raŝo Dargov kaj Saeko Mutoo*



La 1-3an de majo en la urala urbo Sverdlovsk okazis la tradicia renkontigo de volgo-uralaj e-istoj, kiun partoprenis ĉ. 200 personoj el 23 urboj de Sovetunio. La plej granda grupo (30 e-istoj) estis el Tjumenj, kie okazis REVU-XVIII.

La 1an de majo ĉiuj venintoj partoprenis tuturban manifestacion, dediĉitan al la internacia tago de solidareco de la tutmonda laboristaro. Post tio en belaspekta junulara palaco okazis solena malfermo de la Renkontigo. Salutparolis delegaciistoj. Vespere en la kafejo de la kulturpalaco okazis festa koncerto, ludoj, dancoj, amuzado.

La tutan sekvan tagon okupis la konferenco mem. Estis prezentitaj raportoj de la kluboj. Okazis utila interŝanĝo de spertoj en la E-laboro. La ĉeestantoj pridiskutis ankaŭ problemojn de la E-movado en USSR. Estis projektitaj filmoj pri la 64a UK de E-o kaj pri diversaj E-aranĝoj. Vespere la gastoj vizitis teatron, kie ili ĝuis specialan festan programon.

La lasta tago de REVU-XIX komenciĝis per aŭtobusa ekskurso tra la urbo, post kio okazis metodika seminario sub la gvido de k-do Boris Kolker — membro de la prezidio de ASE kaj prezidanto de ĝia instru-metodika komisiono. K-do Kolker ankaŭ rakontis pri sia lernolibro kaj pri ties uzado en elementaj kursoj.

La partoprenintoj disveturis hejmen kun granda danko pro la tiel bone organizita renkontigo far la Sverdlovsk E-klubo.

A. KORJENKOV

La Miassa E-Klubo „Malahita Stelo“ en USSR ĉiujare festas tagon de iu lando. Ĉi-jare oni festis la Tagon de Bulgario, dediĉe al la rusa-bulgara amikeco, kiu havas aparte longan historion. La 3a de marto estas la dato de liberigo de la bulgara popolo el sub otomana jugo helpe de la rusa popolo.

La feston partoprenis gaste e-istoj el u. Celjabinsk. La halo estis ornamita per bulgaraj kaj sovetaj flagetoj kaj per sloganoj pri la amikeco kaj frateco de ambaŭ popoloj. Estis aranĝita ekspozicio el bulgaraj E-libroj, ĵurnaloj, leteroj de bulgaraj amikoj. Sur karto de Bulgario oni fiksis per ruĝaj flagetoj la lokojn, kie okazis gravaj revoluciaj eventoj, kaj per verdaj flagetoj la lokojn de gravaj E-eventoj.

En la programo estis ĝenerala skizo pri Bulgario, rakonto pri vizito en Bulgario, pri la bulgara E-movado, pri la bulgara poezio, teatro, muziko, pri bulgaraj literaturistoj. Estis recititaj poeziaĵoj de Hristo Botev, Ivan Vazov, Orlin Orlinov, Asen Grigorov, Simeon Simeonov, Dančo Danĉev, Marin Băcev, Penka Papazova, Stefka Malčeva. Oni plenumis la kantojn „La verdstela Sofio“ (teksto de K. Gusev), „Aljoŝa“ k.a., ludis la teatraĵeton „Du junulinoj“. Ankaŭ estis prezentita la bulgara kuirarto. Dum la tetrinkado oni gustumis la bulgaran kukon „revanĉ“ kaj halvaon.

La Renkontigo finiĝis per komuna kantado kaj dancoj. La ĉeestantoj estis ege kontentaj, aparte la novaj e-istoj, kiuj unuafoje aŭdis E-parolon en prozo, poezio kaj kantoj. Dank'al nia aranĝo la gejunuloj pli bone konatiĝis kun frata Bulgario.

Tatjana KOPTJAGINA

ANGULENIGMO

Verdaj stebetoj

1 de junio — La Internacia Tago de la Infano

INFANOJ

Infanoj! Kelkaj brunaj kiel bakita pano, aliaj hele-flavaj aŭ nigraj indianoj, infanoj ankaŭ blankaj aŭ kun koloro hela; sed la diferenco estas afero nur ekstera.


Infanoj! Kelkaj loĝas en grandaj domoj ŝtonaj, aliaj nur en tendoj aŭ haloj grandkolonaj, eĉ kelkaj en kabano kotita kaj pajlera; sed la diferenco estas afero nur ekstera.

Infanoj! Kelkaj manĝas buterpanon dum la tago; aliaj ŝatas birdon kapitan nur per sago, aŭ manĝas krudan fiŝon kun apetito kolera; sed la diferenco estas afero nur ekstera.

Infanoj! Kelkaj portas vestaĵon ege varman, aliaj nur burnuson, kokosan tukon ĉarman, aliaj tute nudaj pro varm' duoninfera; sed la diferenco estas afero nur ekstera.

Infanoj en la sudo, infanoj en la nordo, infanoj ĉe montflanko, infanoj ĉe marbordo, infanoj ĉiuj vivas laŭ tre diversaj moroj; aferoj diferencas, sed ne infanaj koroj.

Se ĉiuj povus ludi en unu granda rondo kaj doni al ni pruvon pri paco en la mondo, kaj formi familion el ĉiuj haŭtkoloroj — aferoj diferencas, sed ne infanaj koroj!



En ambaŭ direktoj:

- A — Kolego, amiko.
- B — Publikigo.
- C — Maniero, vojo, procedo.
- D — Delikataodoro.
- E — Goja voĉbruo.
- F — Faro.
- G — Konkluda konjunkcio.
- G — Kemia simbolo de oksigeno.

Stano MARČEK

Solvo de la sllabenigmo el n-ro 2 de „BE“

La necesaj vortoj dekstren: 1. Sufiĉi. 3. Juniper. 5. Aliĝo. 7. Kotizu. 9. Varmigas. 11. Kuraĝo. La vortoj maldekstren: 2. Finfine. 4. Neniam. 6. Tilia. 8. Intima. 10. Admiri. 12. Terasa. Riceviĝas proverbo de Zamenhof: Ne ĉiam per aĝo mezuriĝas saĝo. Korektan solvon de la enigmo sendis Atanas Gaev el Asenovgrad, Bulgario.

POR LA ĈAMPIONO DE LA OLIMPIKOJ—NOBEL-PREMION!

Ni ĉiuj scias la fortan strebon de la antikvaj heleoj al harmonia evoluo de la homa individuo, tial ni ne miras, ke Pitagoro estis ankaŭ perfekta boksisto, kaj la „patro de la medicino“ Hipokrato — rimarkinda atleto. Platono kaj Eŭripido ofte gajnis sportajn premiojn. La sporto helpis al Sofoklo verki unu el siaj plej famaj tragedioj, kiam li estis en la aĝo de 90 jaroj!

La franca poeto Pier (Pierre) de Ronsard antaŭ 4 jarcentoj organizis du teamojn, kiuj ludis ion similan al futbalo kaj konkuris inter si 2—3 fojojn semajne.

Karlo la Granda (Charlemagne) estis konsiderata kiel unu el la plej spertaj naĝmaŝtoj de sia epoko.

Gete (Goethe) tre ŝatis naĝi ne en baseno, sed en malvarmaj montriĵoj.

En iu arkiva noto oni anoncas, ke je la 16a de aprilo 1594 Henriko IV (Herni IV) ludis „jeu de pomme“ kaj sinsekve venkis 27 kontraŭulojn dum tiu ludo, simila al la nuntempa teniso.

Konataj estas ankaŭ okazoj, kiam reĝoj konkuris inter si. Ekzemple la reĝo de Francio Francisko I (François I) superis konvinke Henrikon VIII en lukt-renkontigo.

La fama angla poeto lordo Bajrono skribas en sia taglibro: „Mi naĝas bonege, mi rajdas, kvankam mi ne estas kavaleriano, mi bone skermas, majstre bokas, precipe kiam mi ekregas mian temperamenton. Guste en tiaj momentoj mi sukcesis venki Perling kaj Gekson (Jackson) en „sparing-renkontigoj“. Jackson estis boks-ĉampiono de Anglujo en 1795, kaj Bajrono boksis kontraŭ li en 1808.

Lev Tolstoj okupis sin pri sportekzercoj dum sia tuta longa vivo. En la aĝo de 80 jaroj li facile kaj lerte povis sili sian ĉevalon kaj direkti sin al rajdado. En „Jasnaja poljana“ li havis du „basenojn“. En la lago li naĝis „energie, kiel junulo“, kiam li jam estis maljuniganta. En 1890 Tolstoj estis membro de la Moskva Klubo de Biciklistoj. Per sia biciklo li ofte traveturadis ĉ. kvindek kilometrojn tage. En lia domo en Moskvo estis ĉambro, kie li okupis sin pri gimnastikaj ekzercoj. Tie estis reko kaj „kapro“.

Tolstoj kondukadis tien la infanojn el la vilaĝo kaj montris al ili, kiel oni devas okupi sin pri sporto. Li tre ŝatis la ludon „gorodki“ (rusa sportludo per bastonoj). Dum la vintro li sportis per glitiloj. La kuracisto Zaharin, laŭ la tiamaĵa koncepto, ne konsilis al li okupi sin pri sporto. Tolstoj skribas: „Jen jam pasis 20 jaroj de post la tago, kiam la kuracisto malpermesis al mi iajn ajn sportekzercojn. Li avertis min, ke tio havos por mi malbonajn konsekvencojn. Kaj por mi la konsekvencoj vere estus malbonaj, se mi estus obeinta lin kaj se mi estus ĉesinta ekzercli miajn muskolojn. Tiu ĉi ekupo kontribuas al mia sano, havigas al mi bonan dormon kaj viglan humoron.“

La granda angla kuracisto kaj sciencisto Aleksandro Fleming (Nobel-premiito pro la invento de la penicilino en 1945) estis diversspeca sportisto — li ludis futbalon, akvopilkon, tablotenison, kriketon, golfon, ŝakon, naĝadon, rajdado kaj, krome, estis malpeza atleto kaj gimnastikisto.

Ankaŭ aliaj Nobel-premiitoj estis sportistoj: Ivan Petroviĉ Pavlov, la fama rusa fiziologo, estis perfekta ludanto je „gorodki“; la mondfama Nils Bor estis rezerva golulo de la dana nacia teamo pri futbalo dum la Olimpiadoj en 1908; Frederiko Julio Kjuri longe hezitis, ĉu estiĝi sciencisto aŭ profesia futbalisto. Post la matĉo de la adoleskulaj naciaj teamoj inter Francio kaj Anglio li ricevis oficialan proponon pri profesia kontrakto.

La usona biokemiisto B. Cens, Nobel-premiito pri medicino, estis ĉampiono de la XV-aj Olimpiadoj en Helsinko dum la konkurado per jaĥto.

Ĉiu kultura homo scias pri la famaj polusaj esploroj de Fridtjof Nansen. Sed malmultaj scias, ke antaŭ tio li estis 12-foje ĉampiono de Norvegio pri skikurado kaj mond-ĉampiono pri glitil-kurado. Nur tiel li sukcesas en 1888 fraili 560 km en Gronlando ĉe 50-grada frosto en daŭro de 65 tagoj.

Kompreneble, tiu ĉi nombrado estas tute neplena. Konataj estas la sportpasioj de verkistoj kiel Gek (Jack) London, Ernest Heminguej (Hemingway), Kuprin kaj Albert Kamju (Camus).

INSPIRA KAJ EMOCIPLENA SUKCESO DE V. DAMJANOV EN FRANCO

Antaŭ kelka tempo Veselin Damjanov, artisto de Muzikteatro „Stefan Makedonski“ — Sofio, gastrolis en Francio invitive de la Franca E-Federacio lige kun ĝia 39a kongreso en u. Metc (Metz). Li havis koncertojn en Metc kaj Strasburg. La francaj ĵurnaloj en ambaŭ urboj reeĥis vaste kaj tre pozitive al la koncertoj de nia artisto-esperantisto, donante lokon al intervjuoj kaj recenzoj.

Ĵurnalo „Le republikan Loren“ skribis: „En halo „Braun“ en Metc okazis koncerto de la laŭreato de internaciaj konkursoj V. Damjanov, akompanata de piano fare de Marsel Mersie. Tiu ĉi recitalo de Damjanov konvinkis la publikon, ke E-o estas same vivanta kaj belsona, kiel la naciaj lingvoj, kaj pruvis ĝian superecon ĉe kanta plenumo. Per sia profunda lirismo, varma artisto sento kaj majstra prezento de la teksto Damjanov gajnis la admiron de la publiko. Lia arto estas inspira kaj emociplena.“

Ĵurnalo „Dernier Nuvel d'Alzas“ (Strasburg) skribis: „Tiu bonega kantisto prezentis antaŭ ni riĉan programon, kiu komenciĝis per Mocart kaj finiĝis per Lopec, trapasante tra bone elektitaj bulgaraj kaj rusaj kantoj. Damjanov kantas kun senriproĉa prononco en sep lingvoj, inkluzive Esperanton. Ne ekzistas lingva bariero por tiu homo kun nobla voĉo, egale riĉa kaj en la mallaŭtaĵoj, kaj en la tonalto. Veselin Damjanov manifestis kantarton kun rimarkinda esprimpleno, kiu estis tondre aplaudita.“



LA MOSKVAŬOJ DEZIRAS ORGANIZI LA
OLIMPIKOJN LAŬ PLEJ PERFEKTA
MANIERO!

Ĉio devas esti sur sia loko, ĉio devas funkcii
plej bone... Kaj tio ne estas scienca fikcio,
sed pura realo.



POR LA GASTOJ DE LA OLIMPIKOJ

krom la nova plej moderna sporta ilaro ankaŭ
kelkaj tute novaj hoteloj kaj loĝkompleksoj,
kelkdekoj rekonstruitaj. . .

Malsupre: la nova hotelo „Saljut“ (dek-
stre) kaj la Centra Domo de la Turisto en
Moskvo.

